

Litovio: kvin jaroj en Eŭropa Unio

Monato

30a jarkolekto - aŭgusto-septembro

2009/08-09

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

Hungario:
Venkas
ekstremuloj

Japanio:
Masko-manio

Krimoj
de komunismo

Punoj purigaj



Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj

Lidia Zamenhof

La kompleta verkaro de Lidia Zamenhof, kompilita de Jean Amoureux, Zofia Banet-Fornalowa, Masayosi Higasida kaj Bernhard Westerhoff, kun antaŭparolo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.

La vivon de Lidia Zamenhof, plej juna el la tri Zamenhof-infanoj, stampis la du mond-militoj. La unuan ŝi travivis adoleske kaj dum la dua ŝi pereis koncentre. Ŝiaj en tiu ĉi volumo kolektitaj artikoloj, paroladoj kaj fikciaj verkoj pentras unikan bildon de la periodo intermilita. Ili sumigas al granda, arda prediko por la esperantistojn savi kaj mobilizi. Ŝi volis ilin savi de la regantaj naziismo, rasismo kaj aliaj materiismaj ideologioj. Kaj ŝi sopiris vidi ilin fermenti la venon de paca kaj justa estonteco pri kiu revis ŝia patro kaj kiun profetis ŝia religio.



Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko

Paĝoj: 430

Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2009

ISBN: 978-90-77066-38-6

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de:

Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net
retbutiko@fel.esperanto.be

Mispaŝoj en Makedonio

10

En majo eklaboris la nova prezidanto de Makedonio, George Ivanov. Dum la inaŭgura parolado Ivanov promesis gvidi la landon sendepende de la diversaj nacioj kaj etnoj en ĝi, kontribui al prosperigo kaj bonfartigo de la ekonomio, al aliĝo de la lando al Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo kaj organizaĵoj de Eŭropa Unio kaj al amikeco kun la najbaroj.

Masko-manio

13

Japanoj tre ŝatas surmeti maskon pro diversaj kialoj. Unue multaj kredas, ke decas surporti maskon, kiam ili malvarmumas. Pro la masko ili ne multe ĝenas aliajn, kiam ili tusas kaj ternas.



Punoj purigaj

16



Du studentinoj kaj unu malsana senlaborulino iĝis unuaj viktimoj de la batalo kontraŭ malordo, kiun iniciatis la municipa registaro de Vilnius. La studentinoj punpagis preskaŭ 90 eŭrojn kaj la senlabora virino pli ol 100 eŭrojn...

Supervivo de plej taŭga teorio

22



Verŝajne ne estas alia scienca teorio, kiu elvokas tiom da kontraŭdiroj kiel la teorio de evolucio. Precipe tio koncernas la teorion de Charles Darwin. Kaj estas kompreneble: ĉar la teorio de evolucio kontraŭstaras al la tiel nomata kreismo, la biblia koncepto, laŭ kiu nia universo estis kreata de Dio dum ses tagoj antaŭ ĉirkaŭ 6000 jaroj.

politiko

INTERNACIAJ RILATOJ	9
Necesas senlima pacienco	
ALBANIO	9
Krimoj de komunismo	
BALKANIO	10
Mispaŝoj en Makedonio	
KOSOVO	10
Nova Jerusalemo	
HUNGARIO	11
Venkas ekstremuloj	
REAGO	12
Argumento absurda	

moderna vivo

JAPANIO	13
Masko-manio	
DEMOGRAFIO	13
Popolo ŝrumpanta	
MONDPACO	14
„Postaj tempoj eble pli bone komprenos min”	
LITOVIO	16
Punoj purigaj	
FUTURISMO	16
Verdaj vizitontoj	
SEKURECO	17
Kiam karambolas kamionetoj ...	

ekonomio

LITOVIO: Kvin jaroj en Eŭropa Unio	18
BALKANIO: Montaraj aŭtovojoj	19

turismo

UKRAINIO: Foroso	20
-------------------------------	----

hobio

FINNLANDO: Ĝui simplajn ŝatokupojn subĉiele	21
--	----

scienco

EVOLUCIO	22
Supervivo de plej taŭga teorio	

spirita vivo

FLEGI KAJ KULTURI MEMORON	25
Muzeo pri la historio de pollandaj judoj	

libroj

Bizara romano ... blaisecendrarseska	28
Aventuroplena historia romano	29
Renkontiĝo de du (sub)kulturoj	30

eseo

Pli pri la mistera insulo	31
---------------------------------	----

enigmoj

Trastreku kaj aldonu !	33
La solvo de la litera sudoku de Monato 3/2009	33

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	8
› Anoncetoj	35

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

> Per via FEL-konto.
 > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
 > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen.
 > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
 > El Usono per ordinara usona ĉeko.
 > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validadon fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
 > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
 > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
 > Per bankĉeko traktita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.
 Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	24	27	14,4	5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	24	27	14,4	5	9
Britio	GBP	39	42	23,4	4	7
Bulgario	EUR	26	29	15,6	5	9
Ĉeĥio	EUR	34	37	20,4	5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	40	70
Estonio	EUR	26	29	15,6	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	46	50	27,6	5	9
Grekio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hispanio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hungario	HUF	6950	7750	4170	1340	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	42	45	25,2	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1460
Kanado	CAD	76	80	45,6	9	15
Kipro	EUR	34	37	20,4	5	9
Koreio	EUR	42	45	25,2	5	9
Kostariko	EUR	24	27	14,4	5	9
Kroatio	EUR	26	29	15,6	5	9
Latvio	EUR	26	29	15,6	5	9
Litovio	EUR	26	29	15,6	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	34	37	20,4	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	398	430	238,8	45	73
Nov-Zelando	NZD	105	110	63	11	19
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalia	EUR	42	45	25,2	5	9
Rusio	EUR	24	27	14,4	5	9
Serbio	EUR	25	29	15	5	9
Slovakio	EUR	26	29	15,6	5	9
Slovenio	EUR	34	37	20,4	5	9
Sud-Afriko	EUR	42	45	25,2	5	9
Svedio	SEK	466	499	279,6	49	86
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Usono	USD	78	82	46,8	8	14
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

> **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albue-
 ra Street, Battery Point Tas 7004, Australia.
 Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
 > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
 Reto: leopold.patek@esperanto.at.
 > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140,
 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
 Reto: financo@fel.esperanto.be.
 > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
 Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
 Reto: bel@esperanto.org.br.
 > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio
 de Britio, Esperanto House, Station Road,
 Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE,
 Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
 > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
 de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
 variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
 Reto: cea.polnický@quick.cz.
 > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper,
 Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
 havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
 > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
 93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
 > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
 Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530
 Helsinki, Finnlando.
 Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
 > **Franca:** Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis,
 rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
 Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
 > **Germanaj:**
 > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
 Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero:
 0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
 Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
 91856-676 (BLZ 54510067)).
 Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
 Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
 Mainz.
 Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
 Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de
 Pensions 2100-0461-90-0200055053).
 Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
 Bakatsu. 1/3 III. 1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
 Templeogue Wood, Dublin 12.
 Reto: noviresp@eircom.net.
 > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
 Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
 Reto: esperant@ismennt.is.
 > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
 Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
 > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
 Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
 esperanto@jei.or.jp.
 > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
 Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
 Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca
 > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
 Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
 Rete: esperanto@saluton.net.
 > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
 1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr
 > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
 Duh 130, HR-10000 Zagreb.
 Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecības
 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
 > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Straz-
 nickas, LEA, a.k. 187, LT-01003 Vilnius-C,
 Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
 > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
 0089 3612 0000).
 Reto: esper_lu@geocities.com.
 > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
 Reto: uea@inter.nl.net.
 > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
 Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
 Reto: inform@esperanto.no.
 > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date
 Crescent, Christchurch 8025.
 Reto: gddewar@ihug.co.nz.
 > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
 1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
 O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
 > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
 R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
 > **Ruslandaj:**
 > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
 grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
 Reto: sezonoj@gazinter.net.
 > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
 Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
 42301.810.3.0018.0084867.
 Reto: mikaelo@km.ru.
 > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
 +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
 > **Slovenaj:**
 > Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129
 Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
 > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
 HR-10000 Zagreb.
 Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
 Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
 Reto: beckford@telkomsa.net.
 > **Svedaj:**
 > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
 rantoförbundet, Svartviksvägen 14, S-123
 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
 Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
 Hörby, Svedio.
 Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn
 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
 CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Provokoj



En la fruaj jaroj de MONATO ni ofte havis provokajn artikolojn, kiuj kulture estigis lavangon da leganto-leteroj kaj viglajn diskutojn. Memoru ekzemple la aŭtorojn Bernard Golden aŭ Gilbert Ledon, kiuj vekis protestojn por nekutimaj opinioj. Ankaŭ mi ne malofte rikoltis kritikaĵojn pro komentarioj. Kiam mi karakterizis la NATO-militon kontraŭ Beograd kiel krimon, konata esperantisto proteste malabonis la revuon.

Dum la epoko de la tiel nomita malvarma milito politikaj temoj okupis vastan spacon en nia magazino. Post ties fino kaj post la balkanaj militoj politiko iĝis malpli grava en ĉiuj amaskomunikiloj, sekve – pro manko de ideologiaj disputoj – maloftiĝis ankaŭ provokaj artikoloj. Tio ŝanĝiĝis pro la islamistaj atencoj en Usono en septembro 2001 kaj la posta Irak-milito, kiun ordonis usona prezidento George W. Bush [ĝorg dablju buŝ]. Tiu „milito kontraŭ terorismo“ dis-

dividis la mondon, sed Bush perdis pli kaj pli da subtenantoj. Nun nova usona prezidanto Barack Obama rekondukas sian landon al normaleco, sed tio evidente ne plaĉas al dekstruloj en Usono. Parte ilia rezistado kreas konspirajn teoriojn, kiel montris la artikolo de Alexander Gofen „Obamenaĵo, aŭ haladzo de socialisma aventurismo“ en la junia numero. Jes, tiu artikolo estas provoka, kiel montras la leteroj de legantoj. Certe oni povas disputi, ĉu entute publikigiti tekstoj. Sed ĝi estas klare karakterizita kiel opinio kaj ĝi nek kalumnias nek ofendas iun, krom eble la intelekton. Kaj ni devas akcepti, ke tia dekstrismo estas reala en nia mondo, ne nur en Usono. Ankaŭ en multaj aliaj landoj kreskas dekstraj movadoj kaj partioj, kiel montris ekzemple ĵus la elektoj al la EU-parlamento. Aliflanke, demokratioj devas kaj kapablas elteni tiajn evoluojn. Ankaŭ nia demokrata revuo kapablas elteni ilin.

Nia magazino estas aperta por ĉies opinio, ankaŭ tiu de Gofen kaj kompanoj, eĉ se ni abomenas ĝin. (Cetere, la titolon de la artikolo oni povus facile mislegi: „Abomenaĵo“ ...) Sed se ni konas ilian ideo(logio)n, ni pli facile povas kontraŭbatali. Do skribu vian opinion!

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzojetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Esti usonano aŭ ne (3)

Mi miras, ke MONATO donis tri paĝojn al Alexander Gofen (MONATO 2009/6, p. 10-12) por krei pri supozata krimigo, ke oni permesis al nelegitimumo fariĝi prezidanto de Usono. Devus sufiĉi por malkredindigi la artikolon la aserto pri „la ekonomia katastrofo kaŭzita de la aventurismo de socialismaj elitoj”. Tiuj bankistoj ne havas eĉ guton da ruĝa sango en la vejnoj. Tiaj asertoj estas marko de tiu, kiu vidas konspirojn ĉie.

Gofen citas artikolon 1401(g) de la usona leĝaro (vidu ekzemple www.law.cornell.edu/uscode/8/1401.html), sed misprezentas ĝin. 1401(g) klare diras, ke la patrino devis loĝi en Usono dum almenaŭ kvin jaroj, kaj ke almenaŭ du el tiuj jaroj estu post la aĝo de 14 jaroj. Do eĉ se Obama naskiĝis en Afriko kaj ne en Usono, li estas civitano. La aserto de Gofen estas simple malprava. Krome, plejeble Obama fakte naskiĝis en Usono (en Havajo, kiam ĝi jam estis ŝtato), en kiu okazo li simple estas civitano sendepende de la statuso de la gepatroj.

Bruce SHERWOOD
Usono

Esti usonano aŭ ne (4)

Kiam mi deziras legi novaĵojn el Mirolando, mi turniĝas al klaĉgazeto aŭ al skandalbloĝo, certe ne al MONATO, serioza kulturgazeto. Imagu do mian miron, kiam mi legis artikolon pompe prezentitan kaj ŝoke titolitan, kiu asertas, ke Barack Obama uzurpis la titolon de usona prezidanto, estante nek hereda, nek simpla civitano de Usono.

Mi neniel intencas rifuzi al la aŭtoro la rajton libere prezenti siajn opiniojn. Eĉ se li asertus, ke la tero estas plata, kaj ke nur konspiro kaŝas ĉi veron, mi defendus lian esprimliberon. Mi nur deziras, ke MONATO prudente antaŭkribu la opiniojn, por ne fali en trompkaptilojn damaĝantajn sian kredindecon.

La tezo de Gofen estas plene malkredinda. Barack Obama, filo de usona civitanino, naskiĝinta en usona teritorio, estas denaske usona civitano, sen neceso prezenti iajn ajn kromajn dokumentojn. Se la gofenaj argumentoj estus eĉ etprocente kredindaj, la

opoziciuloj de Obama (milionkapa armeo) estus laŭtege utiligintaj ilin. Tio neniel okazis, ĉar „la kazo senkialas” – ĝuste kiel saĝe verdiktis la supera kortumo. Jen la simpla respondo al la „multaj demandoj” prezentitaj de la artikolverkinto.

Evidente Alexander Gofen estas unu el tiuj dekstremegaj „hiperpartioj”, kies vivokialo estas denunci la komplotojn de la „socialistoj”. Tion pruvas liaj ridindaj asertoj, ke la ekonomian katastrofon kaŭzis la aventurismo de socialismaj elitoj, kaj ke la socialismo infektis Usonon. Tio sufiĉas por malkaŝi la fanatikecon de la gofenaj pozicioj al la redaktoro pri politiko. Tamen tion li ne komprenis. Male, la pompa prezento de la artikolo, la spaco al ĝi donita (tri paĝoj), la elokventa titolo igas la leganton supozi, ke la revuo favoras la absurdajn gofenajn tezojn. Bedaŭrinda okazo, kiu almenaŭ necesigus klarigon.

Sen Rodin
Italio

Esti usonano aŭ ne (5)

Alexander Gofen argumentis, ke Barack Obama ne estas hereda civitano de Usono kaj ne naskiĝis en Usono. Fakte, la praaĵoj de la patrino de Obama loĝis en Usono dum almenaŭ ducent jaroj. Obama naskiĝis en Havajo, ŝtato de Usono, kaj naskiĝo en la teritoriaj limoj de Usono sufiĉas por usona civitaneco.

Gofen imagas iun konspiron por kaŝi informojn pri la naskiĝloko kaj civitaneco de Obama. Sed nur pensu: dum tuta jaro Obama batalis en du elektokampanjoj: 1) kontraŭ Hillary Clinton por esti nomumita kandidato de la Demokrata Partio kaj 2) kontraŭ John McCain por fariĝi prezidanto. La politikaj bataloj estis ferocaj, multekostaj kaj ne ĉiam ĝentilaj. Se estus iu ajn dubo pri la civitaneco de Obama, ĉu vi povas imagi, ke liaj oponantoj decidus ne ekspluati ĝin?

Stevens NORVELL
Kanado

Esti usonano aŭ ne (6)

Kiel ĵurnalistoj, vi, redaktoroj de MONATO, certe scias pli bone ol multaj aliaj homoj, ke abundas ĉe la reto la

plej eksterordinaraj asertoj kaj misprezentoj, ofte de homoj, kiuj pro la propraj motivoj preferas polemiki ol fronti faktojn. Ankaŭ amasas la ebloj pozitivaj aŭ negativaj pri la nuna ŝtatprezidanto de Usono – kaj amasas tiaj artikoloj en la monda gazetaro.

Sed la fantazio de tiu Alexander Gofen apartenas ne al la dua kategorio de pozitiva aŭ negativa kritiko pri prezidanto Obama, sed al la unua kategorio de simplaj falsaj. Ĝi ne meritas la atenton, kiun vi dediĉis al ĝi, kaj ĝia aperigo facile povus konduki al la konkludo, ke la revuo MONATO pretas publikigi ĉion ajn sen kontrolado de la faktoj. Simpla konsulto kun objektiva usona juristo, aŭ simpla serĉo en la reto, produktus amason da materialo, kiu plene refutas la argumentojn pruntitajn fare de s-ro Gofen el superdekstraj bloĝoj diversaj. Mi rekomendas, ke vi konsultu la jenajn fontojn: www.snopes.com, urbanlegends.about.com kaj www.factcheck.org aŭ, se vi ne fidus tiujn vaste fidatajn eksplodigantojn de popularaj mitoj, turnu vin al la bloĝo de la tre respektata *Chicago Tribune*: www.swamppolitics.com/news/politics/blog/2008/12/supreme-court_likely_to_pass_o.html

Se vi ne kredas je grandaj, respektataj ĵurnaloj, turnu vin al ĵurnalo, kies politiko estas ĝenerale konsiderata kiel dekstra: www.washingtontimes.com/news/2008/aug/28/lawsuit-questions-obamas-eligibility-for-office. Mi povus daŭrigi. Sed la mallonga kaj simpla konkludo estas, ke MONATO devus kontroli la faktojn antaŭ ol reprodukti kaj disvastigi tiajn asertojn. Via sinjoro Gofen mirigite demandas, kial neniu intervenis por trakti tiujn asertojn serioze. Eble tio estas, ĉar la asertoj estas tiel facile refuteblaj.

Mi rimarkis, ke vi titolis la artikolon „opinio”, sed la artikolo neniel estas simpla opinio, sed serio da (ankaŭ de vi) kontroleblaj asertoj. Vi ne kontrolis ilin. Kiel fidela leganto de via revuo jam de multaj jaroj, mi estas profunde ŝokita de tiu manko de ĵurnalisma respondeco.

Humphrey TONKIN
Usono

Plia ampleksa reago estas legebla en la rubriko *Politiko*.

Ampleksa NATO

En MONATO 2009/6 p. 8 apud la artikolo pri NATO estas menciitaj inter ties 28 membroj Britio kaj Unuiĝinta Reĝlando. Ŝajnas, ke temas pri la sama lando dufoje, ĉu ne?

Verŝajne la aŭtoro tiom ĝojas pri la aliĝo de sia lando al la krim-organizaĵo, ke li preferas mencii dufoje landon aŭtoritatan anstataŭ iun ne fortan por potenciala bombado de vica Serbio. Nu, tiam li aldonu ankaŭ Usonon, Unuiĝintajn Ŝtatojn kaj Pentagonon. Ankoraŭ NATO bezonas la membrecon de Liĥtenŝtejno, Monako kaj Sanmarino.

Sergeo JURJIĆ
Rusio

Pri la duobligo de la nomo ne kulpas la aŭtoro, sed la persono, kiu liveris la ilustraĵojn por la artikolo kaj la redakcia sekretario, kiu ne sufiĉe atente kontrolis tiun personon. (red.)

Oni povas diri ĉion ajn

La nuna epoko eniros se ne la historion de Usono, almenaŭ la arkivojn de MONATO kiel tragika epoko de socialisma aventurismo (MONATO 2009/6, p. 10-12). Tre interesa estas la aserto, ne argumentita, ĉar prezentata kiel simpla fakto, pri la kaŭzo de la financa krizo.

Kiel jam sciante, la rekta kaŭzo de la krizo estis la konduto de bankoj, kiuj, spekulante je ĉiam altiĝantaj prezoj de nmoveblaĵoj, financis hipotekojn de personoj, kiuj tute ne kapablis repagi, kaj poste vendis iliajn domojn. Sed nun ni lernas, ke tiu konduto de la bankoj ne rezultas el simpla permeso de la antaŭa prezidanto, kiu abolis la ĉi-koncernajn ŝtatajn regulojn. Tute ne: Bush ne permesis, li devigis. La socialisto Bush devigis la bankojn malobservi bankajn regulojn, por atingi, ke ĉiu usonano almenaŭ dum unu jaro spertu la iluzion posedi propran domon.

Jen interesa novaĵo. Eĉ se neniuj kredas ĝin, estas interese konstati, ke ekzistas homoj, kiuj pensas, ke eblas kredi ĝin je tio. Kaj tre fierige por ni, esperantistoj: jen la pruvo, ke per Esperanto oni povas diri ĉion ajn.

Martin DECALUWE
Belgio

Monato
INTERVJUA MAGAZINO-SENDOPAGA

Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe **monato@fel.esperanto.be**.

Problemo nesolvebla

Antaŭ nelonge mortigis teroristoj kelkdekono da senkulpaj homoj en Pakistano. Aliaj atencoj tiaj okazas en aliaj mondopartoj. Sed kio naskas teroristojn?

Tiun demandon neniuj povas respondi, tamen la nombro de teroristoj kreskas. Registaroj, kun siaj armeoj, asignas multe da mono al batalo kontraŭterorisma, sed ankoraŭ ne solvis la problemon. Dume la teroristoj

minacas ĉiujn, malgraŭ tio ke plejparte homoj deziras pace kaj sekure vivi.

Neniu estas denaska teroristo. Kial ili fariĝas teroristoj? Kial teroristoj, kiuj ne nur senkulpulojn, sed ankaŭ sin mem mortigas, tiel traktas la vivon? Ofte ili agas por mistera celo malfacile komprenebla al ordinaraj homoj. Jen situacio ne nur terura, sed ankaŭ bedaŭrinda.

Xu Jinming/pg
Ĉinio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta strat-adreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Kompatinda EU

de Stefan MAUL

La elektoj al la parlamento de Eŭropa Unio (EU) havis du precipe gravajn rezultojn: 1. ekstreme malmultaj civitanoj balotis; 2. konsiderinde kreskis la nombro de balot-raĵtuloj, kiuj subtenas dekstrajn partiojn, kies ekstremaj estas eĉ malamikoj de EU. Ili nun havas propran frakcion, kun 55 mandatoj la kvare plej grandan grupon.

60 % ne elektis

En preskaŭ ĉiuj EU-landoj malpli multaj civitanoj iris al la balotoj ol dum la antaŭa elekto en 2004. Tiam averaĝe estis 45,5 elcentoj, nun nur 42,9. Se ne estus Luksemburgo kun 91,0 elcentoj kaj Belgio kun 90,4, la meza cifero estus eĉ pli mizera. Aliflanke en Slovakio nur 19,6 elcentoj elektis, en Litovio 20,9 kaj en Pollando 24,5, por listigi nur la tri plej malbalotemajn ŝtatojn. Fakte estas do, ke preskaŭ 60 elcentoj de EU-civitanoj fajfas pri sia eŭropa parlamento. Inverse estus relative normala rezulto: 60 elcentoj de elektintoj kaj 40 de rezignintoj. Ĉu do kompatinda EU riskas pereii pro manko de intereso, pro indiferenteco de siaj civitanoj?

Tio estas stranga, ĉar en ĉiuj opinioj la homoj montras sin tre kontentaj pri la komuna Eŭropo kaj aprezas la avantaĝojn, kiujn por ili alportis EU. Ili ĝojas pri la eblo libere vojaĝi sen atenti landlimojn, ke ili povas vivi kaj labori en iu ajn EU-lando, ke ili ne plu devas ŝanĝi monon en ĉiu najbara lando, sed pro la komuna valuto eŭro povas rekte kompari prezojn kaj pagi per samaj biletoj kaj moneroj en tre multaj EU-landoj. Ili fidas, ke la komuna Eŭropo pli bone kapablas majstri la problemojn de la ekonomia krizo, de

klimat-protektado, de energi-liverado, de ekstera kaj sekurec-politiko. La homoj ne nur agnoskas tion, sed laŭ opinioj deziras eĉ pli da eŭropa aktivado en tiuj kampoj. Tamen ili plimulte ne subtenas sian parlamenton, kiu dum jaroj akiris pli kaj pli da potenco.

Komplikaj strukturoj

Ĉu la EU-civitanoj do estas skizofreniaj? Oni devas koncedi, ke EU estas tre komplika konstruaĵo kun strukturoj, kiuj por tre multaj homoj estas netravideblaj. Ni vidis tion, ekzemple, en la diskutoj pri la traktato de Lisbono, per kiu oni volas reformi la union post aliĝo de pluraj orientaj ŝtatoj. La homoj ne komprenas kaj, sekve, parte rifuzas la tekston, en kiu abundas juraj kaj burokrataj frazoj kaj mankas klaraj kaj por ĉiu kompreneblaj eldiroj. Do estas facile por naciismaj partioj misfamigi ĝin per malĝustaj asertoj kaj mensogoj. Ekzemple, ili kritikas, ke per la traktato la unuopaj ŝtatoj perdas sian suverenecon, kio simple estas malvera.

Tamen kulpas ne la homoj, sed la politikistoj, kiuj ne klarigas al sia popolo la EU-politikon, male! Kiu iom observis la elektokampanjojn por la EU-parlamento, devis konstati, ke la temo preskaŭ nenie estis Eŭropo, sed nur la propra lando. Se politikistoj parolis pri EU, ili precipe kritikis Bruselon. Tion faris ne nur tiuj, kies partioj batalas kontraŭ ĝi. Ankaŭ la grandaj partioj emfazis la proprajn interesojn kaj neglektis la union. Tipa slogano estis „por forta Bavario en Eŭropo” (kristansociala partio en Bavario). Ĉu ne pli ĝuste devus esti „por forta Eŭropo en Bavario”? Kiu dum multaj jaroj populisme kritikis la „eŭrokratojn”

ekzemple pro malpermeso de ordinaj elektroampoloj, tiu ne miru, se lia alvoko por elekti EU-parlamenton ne estas aŭdata. Tiuj politikistoj estas aŭ hipokritaj aŭ skizofreniaj, ĉar ili prisi-lentas, ke ne burokratoj en Bruselo faras leĝojn kaj preskribojn. La EU-komisiono rajtas nur proponi leĝojn, pri kiuj tamen decidas ekskluzive la ministroj el la EU-landoj, kaj tiujn leĝojn devas poste aprobi la landaj parlamentoj.

Post la elektoj la politikistoj lamentis pri la rezultoj, kaj analizistoj klarigas, ke EU estas ankoraŭ nur afero de elitoj kaj ke Eŭropo ankoraŭ ne alvenis en la korojn de la civitanoj. Sed ankaŭ tiuj analizistoj apartenas al tiuj elitoj, kiuj fiaskis pri EU. Krome la grandaj partioj ne miru, se ili mem distrumpetas naciismajn argumentojn, ke la homoj ne elektas tiujn partiojn, sed rekte la ekstreme kontraŭeŭropajn kaj naciismajn partiojn. Tiujn krome favoras la malalta procentaĵo de elektintoj – ju malpli multaj elektas, des pli grandaj estas ilia ŝanco gajni mandatojn.

Sen komuna publikeco

Grava manko de EU estas komuna publikeco. Kial la grandaj partioj ne prezentas komunan platformon por ĉiuj landoj? Tion malhelpas ne nur, sed precipe la lingvaj bariloj. La plej grava manko de EU estas ja foresto de komuna lingvo, kvankam Esperanto prezentas perfektan solvon de tiu ĉi problemo. Tial ne ekzistas ankaŭ eŭropaj partioj, sed nur landaj. Nun kelkaj homoj provis establi tiajn partiojn, ekzemple Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE), kiu partoprenis en Francio kaj Germanio. Sed, ho ve, EDE kolektis nur ĉirkaŭ 30 000 voĉojn en Francio kaj 11 859 en Germanio; tio estas 0,05 elcentoj ... Supozeble la elektintoj estis nur esperantistoj, ties familianoj kaj geamikoj. La protagonistoj brave anoncis daŭrigi, sed ĉu ili vere havas ŝancon dum la venontaj balotoj?

Ni povas iomete esperi, ke post ratifo de la traktato de Lisbono fare de Irlando ĝi ekvalidos kaj alportos tiujn reformojn, kiuj helpas resanigi la Union. Sed vere ĝi reviviĝos nur kun komuna lingvo kaj komuna publiko, kaj kun politikistoj, kiuj amas ne nur siajn proprajn landojn, sed ankaŭ la grandan projekton EU. ■

Necesas senlima pacienco

Rusio estas la plej granda lando en la mondo kaj do limas multajn aliajn, ekzemple Norvegon en Eŭropo, Japanion en Azio kaj eĉ Usonon en alia kontinento.

Rusio deklaras partnerajn, egalrajtajn rilatojn kun ĉiuj siaj najbaroj. La ministro pri eksterlandaj aferoj konfirmis, ke plene estas konsentitaj per traktato kaj markitaj sur la mapo la limoj kun Norvegio, Finnlando, Pollando, Mongolio, Norda Koreio kaj Ĉinio.

La traktato kun Estonio estas preta jam de kelkaj jaroj, sed dum ratifado estonoj enigis en la dokumenton eblecon

pri ter-pretenda proceso kontraŭ Rusio. Do la laboro haltis. Nun Eŭropa Unio ne havas precizan limon kun Rusio, malgraŭ tio, ke la Unio ne rajtis membri Estonion sen traktate interkonsentitaj limoj kun ĝiaj najbaroj.

Interkonsentoj

Lim-markado daŭras kun Litovio kaj Kazahio kaj daŭros kun Latvio. Kun Ukrainio traktato estas subskribita kaj validas, sed la limo ankoraŭ ne estas markita. Forestas simila traktato pri maraj limoj en Azova kaj Nigra Maroj. Kun Abĥazio kaj Sud-Osetio estas apartaj in-

terkonsentoj pri la trairo de la limo.

Traktato kun Kartvelio en la nunaj kondiĉoj ne estas klara. Kun Azerbajĝano estas interkonsentitaj pli ol 80 % de la limo. Diskutoj kun Azerbajĝano forestas, sed estas demandoj, kiuj bezonas solvojn. Unu estas la kuniĝo de la limoj rusa, kartvela kaj azerbajĝana.

Kun Japanio oni ne laboras pro pretendoj de Tokio pri la sudaj kurilaj insuloj. Ne estas klara ankaŭ la limo kun Usono. La interkonsento pri maraj spacoj estas subskribita en 1990, sed ankoraŭ ne validas.

Sergeo JURJIC



ALBANIO

Krimoj de komunismo



Nun krimoj de komunismo estas temo de ekspozicio ĉe la Nacia Historia Muzeo en Tirano.

Antaŭ nelonge albanoj rememoris unu el miloj da masakroj okazintaj dum la ĉirkaŭ duonjarcenta komunisma reĝimo. Temas pri la ekzekuto sen juĝproceso de 22 civitanoj akuzitaj pro grenad-eksplozigo en la sovetia ambasadejo en Tirano en februaro 1951.

Tuj post la atako la ministro pri internaj aferoj listigis homojn arestatajn. Inter ili estis eksaj partizanoj dum la kontraŭfaŝista milito, intelektuloj kaj patriotoj, kiuj sin esprimis kontraŭ la politiko de la komunista partio. Ĉiuj estis senkulpaj, elektitaj verŝajne hazarde por

timigi la popolon.

Nur post la masakro la reĝimo organizis surpaperan juĝprocezon por pravigi la mortigojn. Juĝistoj kaj prokuroroj, kiuj ne volis akcepti la proceson, estis tuj maldungitaj aŭ persekutataj. Nur kelkajn monatojn poste oni eksciis pri la veraj kulpuloj pri la atako kontraŭ la ambasadejo: policanoj en la ŝtata sekureco.

Nun krimoj de komunismo estas temo de ekspozicio ĉe la Nacia Historia Muzeo en Tirano.

Bardhyl SELIMI

BALKANIO

Mispaŝoj en Makedonio



En majo eklaboris la nova prezidanto de Makedonio, George Ivanov.

En majo eklaboris la nova prezidanto de Makedonio, George Ivanov. Lin proponis kaj forte subtenis la reganta dekstra partio de ĉefministro Nikola Gruevski. Tamen la albanoj, konsistigantaj notindan elcenton de la loĝantaro de tiu ĉi respubliko, ĝenerale ne subtenis lin.

Dum la inaŭgura parolado Ivanov promesis gvidi la landon sendepende de la diversaj nacioj kaj etnoj en ĝi, kontribui al prosperigo kaj bonfartigo de la ekonomio, al aliĝo de la lando al Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo kaj organizaĵoj de Eŭropa Unio kaj al amikeco kun la najbaroj.

Bedaŭrinde tre baldaŭ post tiu ĉi deklaro okazis la jena mispaŝo: li ne invitis al la inaŭguraj solenaĵoj Fatmir Sejdiu, la prezidanton de Kosovo, la nova kaj najbara ŝtato, kvankam Makedonio estas agnoskinta Kosovon kune kun ankaŭ Montenegro. La supozebla

kialo: la ĉeesto de la serba prezidanto Boris Tadić.

Mispaŝo

Neoficiale, tamen, Ivanov deklaris, ke la unua fremda ŝtatestro akceptota de li estos ĝuste Fatmir Sejdiu. Tion bonvenigis kosovanoj. Sed sekvis dua mispaŝo: montriĝis, ke la kosova prezidanto ne estos akceptita kiel ŝtatestro, do sen la kutimaj solenaĵoj, pro la aparta statuso de Kosovo. Rezulte Sejdiu nuligis la viziton.

Cetere, dum kunveno de la Organizaĵo de la Islama Konferenco en Damasko (Sirio) estis unuvoĉe aprobita la propono de la albana delegitaro, forte subtenata de Sauda Arabio, favore al agnosko de Kosovo kiel sendependa ŝtato. Ĝis nun 13 el la 57 membro-ŝtatoj de tiu organizaĵo agnoskas Kosovon kaj 60 ŝtatoj entute.

Bardhyll SELIMI

KOSOVO

Nova Jerusalemo

Oni nomas la dividitan nordan urbon de Kosovo, Mitrovicon, la nova Jerusalemo. Tie restas serbaj loĝantoj de Kosovo, kiuj obeas ne la registaron en Prishtina sed nur la politikajn strukturojn subtenatajn de Serbio. En Mitrovico, dum la milito de 1998-1999, pereis multaj homoj kaj estis detruitaj domoj de albanoj.

Pro la premo de lokaj serboj, centoj da albanaj familioj forlasis siajn hejmojn kaj fuĝis al la suda parto de la urbo aŭ aliloken en Kosovo. Post 1999 oni provis persvadi ilin hejmeniri kaj rekonstrui iliajn domojn, sed vane, ĉar lokaj serboj faris sian plejblon por kontraŭstari. Dume la registaro finance helpis rekonstrui centojn da serbaj domoj.


Perforte

Lastatempe kvin albanaj familioj decidis rekonstrui siajn hejmojn en la kvartalo Berdjane, ĉe la loko *Kroi i Vitokut* aŭ Akvofonto de Vitok. Protektis ilin la polico, same anoj de la Kosova Taĉmento (KFOR) aŭspiciata de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Tamen ĉiutage lokaj serboj perforte protestis, uzante ŝtonojn kaj eĉ kartoĉojn kaj grenadojn kontraŭ la polico. Ĉi-lastata intervenis per larmiga gaso.

Antaŭe, serboj proponis al albanoj monon por aĉeti ties domojn kaj parcelojn proksime al la *Kroi i Vitakut*. Sed nun pro la rekonstruado velkas ofertoj tiaj. Helpas la vortoj de la kosova prezidanto Fatmir Sejdiu: „Ni strebas, ke Kosovo estu demokratia ŝtato por ĉiuj siaj civitanoj kun aparta atento pri malplimultoj.”

Bardhyll SELIMI

Venkas ekstremuloj



La ekstremdekstra „Jobbik” akiris tri mandatojn en la EU-elektoj. Jobbik, kiu signifas hungare pli bona, dume jobb signifas dekstra, eĉ ne estas politika partio. Tamen ĝi fifamiĝis pro kontraŭciganaj kaj kontraŭjudaj sloganoj kaj politikadas eĉ kontraŭ la EU.

Forte skuis la financa krizo Hungarion. La socialista minoritata kabineto helpe de Eŭropa Unio (EU) regis la situacion, sed la loĝantaro jam sentis pli malbonajn vivkondiĉojn. Multaj hungaroj postulis novan parlamentan balotadon, tial laŭ la konstitucio la parlamento faris tujan kabinetoŝanĝon.

La nova ministrestro fariĝis Gordon Bajnai, eksministro, kiu ne ligiĝas al partio. La socialistoj kaj la liberaldemokratoj promesis al li parlamentan plimulton. Poste okazis tri elektoj, kiam furore sukcesis la dekstrula opozicio. Ekzemple en la urbo Pécs [peĉ] elektigis dekstruloj kaj kiel parlamentano kaj kiel

urbestro. Simile venkis dekstruloj en la EU-elektoj komence de junio.

Sloganoj

Partoprenis la EU-elektojn, malpli da homoj ol antaŭ kvin jaroj. Tamen voĉdonis pli ol triono de la voĉdonrajtuloj. El 22 mandatoj la opozicia „jundemokratoj” akiris 14. La alia opozicia partio MDF akiris unu, sed la ekstremdekstra „Jobbik” akiris tri. Jobbik, kiu signifas hungare pli bona, dume *jobb* signifas dekstra, eĉ ne estas politika partio. Tamen ĝi fifamiĝis pro kontraŭciganaj kaj kontraŭjudaj sloganoj kaj politikadas eĉ kontraŭ la EU. La

socialistoj akiris nur kvar seĝojn.

La liberaldemokratoj ne plu havas mandaton. Antaŭ unu jaro ili forlasis la koalicion, kio ne plaĉis al voĉdonantoj. La fiasko estis tiel granda, ke la ĵus fondita partio LMP (= Povas esti Alia la Politiko) superis la liberaldemokratojn.

Spite al la perdoj en la EU-elektoj la kabineto daŭre laboros ĝis la enlanda balotado okazonta post naŭ monatoj. La liberaldemokratoj daŭre apogos la kabineton, sed verŝajne perdos mandatojn ankaŭ en la hungara parlamento. La granda perdo estas tamen tio, ke hungaraj ekstremuloj nun rajtas politikumi en la EU.

Karlo JUHÁSZ

REAGO

Argumento absurda

Obamenaĵo, aŭ haladzo de socialisma aventurismo

Tiel historiistoj de la esotico verŝajne memus la nunan tagigan epokon de usona historio. Verdire, ekzistas antaŭaj registaroj, kiuj ekis socialisman aventurismen. Clinton kaj Bush (la filo), sekvante utopiajn ideojn, desigis bankroton, rompis la regularon kaj finacis hipotekon de tiuj, kiuj nek kapablis nek plene redoni la ŝuldojn.

Tamen en tiu artikolo temas nek pri la socialismo infektitita Usono, nek pri la ekonomia katastrofo, kaptita de la aventurismo de socialismaj elitoj. Temas pri valdeto de la lando-fundamento rezulte de neglektemo flanke de la tri heredoj de la Burgegoj kaj de la du ĉefpartioj (praktike jam kvazaŭ unu). Rezulte, en la prezidenta fotelo de Usono nun sidas... uzurpulo.

„Jia jen denove konspira teorio“, ekprenas albe leganto, al kiu la usona komunikilara membris, ke ĉiu ajn, kiu pridubas la legende de Obama, estas obcedita herendo (angle *hered*), kiu dubas pri la valideco de la naskiĝloko de Obama.

Ne. Usonaj estas neniu katinj anĝelaj sekularaj nekonservativaj itakaj. Nur ĝenerale konataj anĝelaj konservativaj fikcioj estas tiu ĉi prezentaro.



Tamen kio pri la valideco de Obama?

Laŭ la oficiala biografio, la biologie patro de Obama estis civitano de Kenjo (aŭ Britio), de Obama ne estas hereda civitano de Usono.

Nur pro tio li ne rajtas nek servi kiel prezidanto de Usono nek kampanji kiel kandidato.

Konstitucio

Laŭ la konstitucio de Usono, artikolo II, sekcio 1 (4), „neniu krom hereda civitano (angle: *natural born citizen*), aŭ civitano de Usono, dum aprobo de tiu ĉi konstitucio, rajtas okupi la postenojn de la prezidanto.“


Atentu: la patruj-fundusoj certe distingi inter la nocion „civitano“ kaj „hereda civitano“, komprenante, ke li mem ja ne povas esti heredi civitanon

de dume ne ekzistanta lando. Tiel ili rezervas la kondiĉon de simpla civitaneco sed nur por siaj samtempuloj.

La nocio „hereda civitaneco“ (angle: *natural born*) restis ne difinita en la konstitucio kiel nomezinta dum la epoko

50

Marto • junio 2009



INTIMAGES

Estas kompreneble, ke oni povas kaj volas kontraŭi la politikan programon de Obama ...

....tamen esperantistoj meritas pli honestan diskuton kaj ne absurdan debaton pri la naskiĝlokoj de la du prezidantaj kandidatoj Obama kaj McCain [makejn].

Do forte eraras Gofen, kiam li asertas, ke en la Blanka Domo enloĝiĝis „uzurpulo“.

Eĉ la titolo de la artikolo de samideano Alexander Gofen absurdas: „Obamenaĵo, aŭ haladzo de socialisma aventurismo” (MONATO, 2009/6, p. 10-12). La aŭtoro krias „fraŭdo!” koncerne la naskiĝlokon de la usona prezidanto Barack Obama.

Jen kutima strategio de la ekstrema flanko de la Respublikana Partio kontraŭ la pli liberala administracio de la Demokrata Partio, kiu nun regas la leĝfarantan kongreson. Estas surprize, ke Gofen uzas tian taktikon, ĉar Obama ne estas radikala aventuristo aŭ socialisto laŭ iu ajn mezurebla normo.

Konstitucio

Laŭ la usona konstitucio „neniu krom hereda civitano, aŭ civitano de Usono dum aprobo de tiu ĉi konstitucio, rajtas okupi la postenojn de prezidanto.” Sekve samideano Gofen eniras sensignifan diskuton pri la diferenco inter hereda kaj ordinara civitano. Tiaj detaloj ne rilatas

al la temo pri la naskiĝloko de Obama.

Ekstremaj dekstraj politikistoj per televido kaj radio papage ripetas falsan respondon post vera repliko pri la naskiĝloko de Obama. Neniaj dokumentoj povas satigi fanatikulojn, eĉ kiam ili vid-al-vidas al nedisputebla kaj ekvilibra evidenteco. Estas malfacile kompreni, kial Gofen sekvas argumenton uzatan ekzemple de Rush Limbaugh [raŝ limbo] kaj aliaj, kiuj sensence aplikas tiel nomatajn konspiraajn teoriojn al siaj politikaj kontraŭuloj.

Insisto

Kaj kiu estas Alan Keys [alen kiz] citata de Gofen? Li estis respublikana opo-nanto de Obama en senata kampanjo en la ŝtato Ilinojso en la jaro 2004. Tute male, la persisto de la gepatroj de Obama, de

la ŝtato Havajo, la naskiĝanonco en tiea loka ĵurnalo, artikolo de profesoro Paul Campos [kampus], ĉiuj kontraŭstaras la nocion, ke Obama naskiĝis iel ekster la teritorioj de Usono.

Estas kompreneble, ke oni povas kaj volas kontraŭi la politikan programon de Obama. Tamen ataki lin senkaŭze pro islamaj ligoj, kiel kritikistoj sensukcese propagandis, aŭ sugestis, ke li partoprenas en ia nacia konspiro, kuŝas preter racio.

Esperantistoj meritas pli honestan diskuton kaj ne absurdan debaton pri la naskiĝlokoj de la du prezidantaj kandidatoj Obama kaj McCain [makejn]. Do forte eraras Gofen, kiam li asertas, ke en la Blanka Domo enloĝiĝis „uzurpulo”.

Elson B. SNOW

Masko-manio

Japanoj tre ŝatas surmeti maskon pro diversaj kialoj. Unue multaj kredas, ke decas surporti maskon, kiam ili malvarmumas. Pro la masko ili ne multe ĝenas aliajn, kiam ili tusas kaj ternas.

Due ili kredas, ke masko protektas ilin kontraŭ bakterioj kaj virusoj disĵetataj de malsanuloj. Trie, masko varmigas. En vintro malvarmaj ventoj venas de Siberio kaj en regionoj laŭ Pacifiko atakas sekaj ventoj. Por protekti sin kontraŭ tiuj ventoj, ili surportas maskojn.

Kvare dum la lasta trideko da jaroj multaj suferas pro polenallergio. Fine de vintro japanaj cedroj ekfloras kaj elĵetas grandan kvanton da poleno. Laŭ enketo farita de la ĵurnalo *Asahi*, 43 % de la japanoj suferas pro polenallergio. El tiuj 37 % suferas pli ol 16 jarojn, 14 % 10-15 jarojn kaj 18 % 5-10 jarojn. Por defendi sin, multaj surportas maskojn, eĉ naĝ-okulvitrojn, por ne enspiri polenon.

Birdo-gripo

Tiu ĉi masko-manio pli fortiĝis, kiam minacis netipa pneŭmonio (sarso) kaj birdo-gripo. Dume higien-kompanioj progresigis la kvaliton de maskoj, kaj nun vidiĝas en vendejoj diversspecaj maskoj. Tiel Japanio fariĝis la plej elstara lando pro masko-kulturo.

Nun, kiam meze de majo novspeca gripo ekaperis en Japanio, draste multiĝis maskuloj. La ministrejo pri bonfarto kaj laboro rekomendas surporti maskojn en homplenaj lokoj por efike kontraŭstari la gripon. Rezulte kelkaj lernejoj, vendejoj kaj kompanioj devigas lernantojn, komizojn kaj laborantojn surhavi maskon.

En apotekoj, kie oni vendas maskojn, svasmas klientoj, tiel ke aŭdiĝas plendoj pri manko de maskoj. Oni diras, ke la vendosumo de maskoj en 2008 estis 20 miliardoj da enoj (154 milionoj da eŭroj). Pro la gripo nur higien-kompanioj prosperas en la nuna stagna ekonomio.

HORI JASUO



Pro diversaj kialoj japanoj tre ŝatas maskojn.

Popolo ŝrumpanta



TEG GREENY

Konstante kreskas la monda loĝantaro. Post proksimume 40 jaroj ĝi nombros naŭ miliardojn: la kresko devenos ĉefe de landoj en Azio kaj Afriko. Sed en Ukrainio (same kiel en Rusio kaj Belorusio) malkreskos la popolo.

Laŭ Unuiĝintaj Nacioj (UN) vivis sur la tergloblo en 1950 2529 miliardoj da homoj; en 2009 6829. Daŭre kreskos la cifero ĝis en 2015 proksimume 7302, kaj en 2050 ĝis 9149. En la samaj jaroj la ukraina loĝantaro jenas: 37; 46; 44; 35. Do en la daŭro de 100 jaroj la loĝantaro – kontraste al multe aliaj landoj – malkreskos.

Same en najbaraj landoj Rusio kaj Belorusio. Jen la samjaraj ciferoj: Rusio – 103; 141; 138; 116; Belorusio – 7,7; 9,6; 9,3; 7,3. Kontraste: en Usono – 158; 315; 333; 404; Barato – 371; 1198; 1294; 1613; Ĉinio – 544; 1345; 1395; 1417; kaj Brazilo – 52; 193; 202; 218.

El tio sekvas konstanta maljuniĝo de la loĝantaro en Ukrainio. Nun la meza ago estas 39 jaroj; laŭ UN post dek jaroj ĝi estos 40.

Dmitrij ĈIBULEVSKIJ

„Postaj tempoj eble pli bone komprenos min”

En la sama jaro, kiam Zamenhof publikigis sian internacian lingvon, naskiĝis en sud-orient-germana vilaĝeto Max Josef Metzger [maks jozef meĉger]: 1887. Post lerneaj jaroj li studis katolikan teologion, doktoriĝis kaj laboris kiel vikario en hejma regiono.

Kiam Germanio deklaris militon kontraŭ Francio en aŭgusto 1914, la juna sacerdoto tuj patriotece sin registrigis kiel volontula militpastro. Kun la soldatoj li celebris mesojn kaj preĝis por ilia glora venko. Por liaj religiaj admono kaj subteno de la milit-entuziasmo li ricevis ordenojn. En 1915 li ĉeestis kruelajn batalojn en Francio, konsciiĝis pri la mortiga fataleco de milito. Samtempe li ege malsaniĝis kaj poste estis sentaŭga por militservo.

Laborlingvo

En oktobro 1915 li translokiĝis al Graz, Aŭstrio, kiel ĝenerala sekretario de la Asocio de Abstinemaj Katolikoj, kaj fondis la Mondpacan Ligon de la Blanka Kruco, memorigante per nomo kaj simbolo je la Ruĝa Kruco. Baldaŭ li tie uzis Esperanton kiel oficialan laborlingvon. Ankaŭ de siaj kunlaborantoj li postulis, ke ili lernu la zamenhofan lingvon. Tiutempe multaj homoj esperis, ke ĝi baldaŭ iĝos vaste uzata vera mondlingvo.

Post la milito kaj la pactraktato de Versailles [versáj] Metzger estis la unua germana civitano, kiu oficiale ricevis la rajton publike paroli en Francio. Kaj li sekvis la inviton partopreni intertrak-


tadojn preparantajn la fondiĝon de la Ligo de Nacioj, el kiu jardekojn poste sekvis Unuiĝintaj Nacioj. Dume tamen reprezentantoj de la katolika eklezio suspekteme observis liajn agadojn kaj publikaĵojn.

Toleremo

Li – ne tute memvole – translokiĝis al la urbeto Meitingen en Bavario, Germanio, kie li daŭrigis sian laboron, gvidante la Asocion de Reĝo Kristo (*Societas Christi Regis*). En letero al papo Pio la 12a li proponis ekumenan koncilion. Li fondis la kristanan asocion *Una Sancta*, kiu postulis kaj preparis la reunuiĝon de katolika kaj protestanta eklezioj, kaj certe ankaŭ subtenis toleremon kaj kun-



Religiemuloj, edukistoj, sciencistoj kaj esperantistoj ĉeestis la memorkunvenon pri Max Josef Metzger.



**En letero al papo Pio la 12a
Metzger proponis
ekumenan koncilion.
Li fondis la kristanan
asocion Una Sancta,
kiu postulis kaj preparis
la reunuiĝon
de katolika
kaj protestanta eklezioj,
kaj certe ankaŭ subtenis
toleremon kaj kunlaboron
inter ĉiuj aliaj religioj.**

laboron inter ĉiuj aliaj religioj.

Venis tiranoj: Hitler kaj nazi-reĝimo. Metzger plurfoje estis arestita. En oktobro 1943 li estis kondamnita je morto en fia pseŭdoproceso gvidita de „furioza Rolando” (germane: *rasender Roland* – Roland Freisler, vidu eo.wikipedia.org/wiki/Roland_Freisler). Li estis skribinta kaŝleteron al tiama sveda episkopo de Upsala kun propono, post fino de tiu Hitler-milito, konstrui Germanion demokratan en unuiĝanta Eŭropo.

Muzikaĵoj

Katenite Metzger atendis pli ol duonan jaron en karcera ĉelo, kie li skribis en malgrandegaj literoj sur la randoj kaj malplenaj paĝoj de biblio, kiun oni permesis al li kiel solan legaĵon. Li verkis



Okaze de la 65a datreveno de la mortigo de Metzger okazis memorkunveno en kiu partoprenis membroj de diversaj organizaĵoj.

poemojn kaj komponis muzikaĵojn.

La 17an de aprilo 1944 oni gvidis lin el la ĉelo en la mortoĉambron, kie oni demandis pri lia nomo, oficiale kontrolis lian identecon kaj senkapigis lin per giloto. La proceduro daŭris entute sep sekundojn – tiel oni zorge protokolis.

Okaze de la 65a datreveno de tiu mortigo okazis memorkunveno, kiun partoprenis diversaj organizaĵoj: katolika *Pax Christi* (paco de Kristo); sindikato de edukistoj kaj sciencistoj; alianco por homa digno; kaj Esperanto-lingvoklubo Augsburg. Interalie estis parolado ankaŭ en Esperanto: Max Josef Metzger „estis patro de la mondpaca movado”, diris la parolanto, kaj „multflanke ekzemplodona, tiom bunta, ke ĉiu el ni speguliĝe sin retrovas”.

Filmo

Inter la partoprenantoj estis katolikaj pastroj, anoj de Asocio Reĝo Kristo, viktimoj de nazireĝimo, antifaŝistoj, sindikatanoj, politikistoj kaj esperantistoj. Eminentulo estis la holokaŭstpostvivanto Mietek Pemper, 89-jaraĝa, kiu konsilis la reĝisoron Steven Spielberg [stivn spilberg] dum la farado de la filmo *Listo de Schindler* [ŝindler] en Krakovo.

Post depono de florbukedoj la ĉeestantoj iris al la proksima kinejo Thalia, kie estis montrata filmo pri Max Josef Metzger, kiu adiaŭis el sia vivo per la vortoj: „Postaj tempoj eble pli bone komprenos min – ĉar estis ĉiam mia fatalo, ke mi antaŭis la tempon kaj tial ne povis esti komprenata”.

Jomo IPFELKOFER

LITOVIO

Punoj purigaj



Aparte cigaredrestaĵoj malbeligas la litovan ĉefurbon.



La urbestro de Vilnius, Vilius Navickas, kredas, ke publika punlaboro efikas kontraŭ malordemaj gejunuloj.

Du studentinoj kaj unu malsana senlaborulino iĝis unuaj viktimoj de la batalo kontraŭ malordo, kiun iniciatis la municipa registaro de Vilnius. La studentinoj punpagis preskaŭ 90 eŭrojn kaj la senlabora virino pli ol 100 eŭrojn, ĉar ŝi ne akceptis sian kulpon. La tri punitoj kontraŭleĝe ĵetis cigaredrestaĵojn sur la straton.

La urbestro de Vilnius, Vilius Navic-

kas, tiurilate estas rigora. „Necesas puni ĉiujn, kiuj malpurigas la urbon kaj faras tion intence. Precipe ni devus eduki la junularon. Probable ni ne nur punos deliktemajn personojn, sed ankaŭ devigos ilin publike labori. Ili ordigu la urbon, balau stratojn, kolektu cigaredrestaĵojn”, li diris.

Aŭtoj

Por ke la litova ĉefurbo Vilnius fariĝu pli pura kaj bela, la urba municipo decidis puni ne nur malpurigantojn, sed ankaŭ malordemajn hejmbestposedantojn; loĝantojn, kiuj lasas siajn aŭtojn sur herbejoj; kaj personojn, kiuj publike uzas alkoholaĵojn aŭ kiuj maldece fumas.

Tiuj, kiuj ne emas serĉi rubujon, sed ĵetas restaĵojn sur la straton, riskas esti punitaj ĝis 580 eŭroj. Krome informo pri ili estos publikigita en municipa interreta paĝo kun indiko: „Ili malpurigas nian urbon.”

FUTURISMO

Verdaj vizitontoj



Konsterniĝis altranguloj en Litovio – la prezidanto Valdas Adamkus, la ĉefministro Andrius Kubilius kaj la parlamentestro Arunas Valinskas –, kiam ili ricevis strangan leteron. Skribis tiel nomataj Rael-adeptoj, kiuj petis terenon por konstrui en Litovio NIFO-ambasadejon (NIFO = Neidentigita Fluganta Objekto). Laŭ la adeptoj la NIFO-civilizacio planas viziti la teron en la jaro 2035.

Laŭdire ĵurnalisto kaj kantisto Claude Vorilhon, konata kiel Rael, renkontis en 1973 en Francio verdhaŭtan eŭropec-aspektan vivulon, 25 000-jaraĝan, el la planedo Elohim. La eksterterano invitis la ĵurnaliston al sia fluganta telero.

Science

Tie, laŭ la famo, Rael malkovris la „veron” pri la Sankta Skribo. La verdhaŭtulo neis la teoriojn de Charles Darwin, klarigante, ke homojn science kreis eksterteraj civilizacioj, kiuj perfekte regas genetikajn teknologiojn. La Rael-adeptoj kredas, ke la kosmaj vivuloj nun volas reveni al siaj idoj. Tial ili bezonas alteriĝejon aŭ ambasadejon.

En sia letero la Rael-adeptoj rimarkis, ke Litovio estas kuraĝa kaj gastama lando. Adepto-delegacio, kiu vizitis Litovion, volis, ke Litovio estu la unua lando, kiu renkontos la eksterteranojn.

SEKURECO

Kiam karambolas kamionetoj ...

NEOPORCUPINE

Kamionetoj endanĝerigas la trafikan sekurecon. Studo de la „Instituto pri Daŭra Movebleco” de la universitato en Gent (Belgio) konstatas, ke ili kaŭzas ekstreme multajn akcidentojn.

La ĉi-specaj veturiloj jam ne ĝuas bonan reputacion, sed nun pruviĝas la supozoj. Kamionetoj multe pli implikiĝas en akcidentoj ol aliaj veturiloj. La nombro de liveraŭtoj altiĝis inter 1997 kaj 2007 je pli ol 60 %, kaj ankaŭ la nombro de aliaj veturiloj. Tamen ĝenerale akcidentoj kun vunditoj samperio de malkreskis je 27 %, sed, se oni konsideras akcidentojn kun kamionetoj, tiuj kreskis je 21 %.

Simila diferenco vidiĝas en la ciferoj pri akcidentoj kun mortintoj: falo de 40 % ĉe ĉiuj veturiloj, sed nur 10 % ĉe kamionetoj. Plej trafa estas la diferenco

sur aŭtoŝoseoj: akcidentoj kun vunditoj en tiu sama periodo kreskis ĝenerale je 26 %, sed ĉe kamionetoj je 83 %.

Varia rezulto

Kompari ĉirkaŭajn landojn montras varian rezulton. Ankaŭ en Nederlando liveraŭtoj estas specifa fonto de transporta malsekureco, sed malpli ol en Belgio. En Britio, kamionetoj sekvas ĝeneralan malkreskon de akcidentoj. Tamen en Germanio la situacio estas pli malbona ol en Belgio.

La malsekureco ĉe kamionetoj ŝuldiĝas ofte al tro alta rapideco kaj tiala perdo de koncentriĝo.

Sed, plej grave, ĉe 90 % de la akcidentoj kun kamioneto kulpas la ŝoforo.

Tiea esploro montras, ke la malsekureco ĉe kamionetoj ŝuldiĝas ofte al tro alta rapideco kaj tiala perdo de koncentriĝo. Sed, plej grave, ĉe 90 % de la akcidentoj kun kamioneto kulpas la ŝoforo.

Tial la esploristoj de Gent pledas por deviga rapid-limigilo de 90 aŭ 100 km hore, kiu jam ekzistas por kamionoj kaj aŭtobusoj. Ĉar necesos eŭropa regulo, ili insistas, ke Belgio voĉdonigu ĝin dum sia prezidanteco de Eŭropa Unio en 2010.

Ivo DURWAEL

LITOVIO

Kvin jaroj en Eŭropa Unio

Profesoro Jonas Čičinskas de la Instituto pri internaciaj rilatoj kaj politiko de la Universitato de Vilnius opinias, ke Litovio dum la kvin jaroj de sia aneco en Eŭropa Unio (EU) gajnis multon. Tamen por atingi averaĝan vivnivelon de EU la litovoj ankoraŭ bezonas 15 jarojn.

Kvinjara aniĝo de Litovio en EU por la poŝto de statistika litovo alportis duoblan salajron, sed ankaŭ duoblan prezon por multaj ĉiutage uzataj produktoj. Se ni komparas la prezojn de antaŭ la aniĝo en EU je la 1a de majo 2004 kun la hodiaŭaj ni rimarkas, ke i.a. altiĝis prezoj de terpomoj (de 0,17 EUR ĝis 0,38 EUR) kaj de kilogramo de sekala pano (de 0,62 EUR ĝis 1,31 EUR). Inter la ĉefaj produktoj nur sukero nun kostas iom malpli ol antaŭ kvin jaroj.

EU manifestiĝas ne nur per kresko de prezoj kaj vigla ekonomio sed ankaŭ per altiĝo de enspezoj. La meza pensio kreskis de 107,74 EUR ĝis 234,59 EUR, la minimuma monata salajro de 144,81 EUR ĝis 231,70 EUR kaj la averaĝa neta monata salajro de 241,83 EUR ĝis 513,50 EUR. Hodiaŭ litovoj atingas ĉirkaŭ 60 % de la averaĝa EU-vivnivelo, kompare kun nur ĉirkaŭ 40 % antaŭ kvin jaroj.

Falis la kvanto de loĝantaro. La grandega elmigrado estas konsiderata kiel la plej serioza perdo de la lando. Antaŭ kvin jaroj Litovio havis 3,425 milionojn da loĝantoj kaj nun 3,346 milionojn.

Kiel ni vivus se ni estus ekster EU?

„Probable ni estus kvazaŭ blanka korvo inter la postkomunismaj landoj, ĉar la aliaj estus en EU. Eble ni havus pli da propraj bankoj kaj asekuraj kompanioj, sed tiuj estus malmalmodernaj kaj malfortaj. Supozeble nia ekonomio estus direktita al Ruslando aŭ Ukrainio, dum komercado kun Okcidento estus pli malfacila. Ni produktus pli por Oriento ol por Okcidento”, opinias profesoro Čičinskas.

Liaopinie, Litovio eluzis siajn eblojn je 75 %; por atingi la averaĝan EU-vivnivelon ĝi bezonas ankoraŭ 15 jarojn. La plej granda malsukceso de Litovio estas la nesufiĉa modernigo de ekonomio; la plej sukcesa estas la komerco orientita al Okcidento. Li aldonas, ke gravan instigon por la ekonomio donus alveno de grandaj investantoj.

La prognozoj por la estonteco ne estas optimismaj. Onidire la ekonomio de la lando ĉi-jare falos je 11 %, dum en la eŭro-landoj oni antaŭvidas falon de nur 4 %. La senlaboreco en Litovio ĉi-jare atingos 13,8 % kaj sekvontjare 15,9 %. La sola fajrero de espero estas la malkresko de la inflacio, kiu ĉi-jare devus esti 3,6 %. Sekvontjare ni atendu eĉ deflacion je 0,4 %.

LAST



Montaraj aŭtovojoj

Okcidenta Balkanio konsistas el landoj, kies reliefo estas relative montara. Tio malfaciligas la komunikadon en la regiono kaj eksteren. Plej postrestintaj estas Albanio, Makedonio, Kosovo kaj Montenegro.



NET EFFECT

Por Makedonio kaj Kosovo tio des pli problems, ke ambaŭ landoj ne havas maran koridoron, do ne konsideratas mediteraneaj, kvankam ili situas tre proksime al la Adriatika, Ionia kaj Egea maroj, partoj de Mediteraneo. La ekzistantaj aŭtoŝoseoj ligantaj ilin kun la maro je distanco de kelkcent kilometroj trapasas montaran regionon en Albanio kaj Montenegro.

Dum la lastaj jaroj okazis grandaj laboroj en Albanio por konstrui novajn aŭtoŝoseojn ligantajn Kosovon kaj Mak-

edonion kun Adriatiko, tra la marhaveno de Durrës. La unua, konstruata de uson-turka kompanio, estas jam finiĝonta danke al la investaĵo registara de pli ol miliardo da eŭroj. La projekto antaŭvidas duoblan tunelon tramontegan ses kilometrojn longan kaj la konstruon de kelkdek altaj pontoj kaj aliaj vojartaĵoj. La veturado iĝos komforta, mallongtempa kaj sekura ankaŭ dumvintre. Danke al tiu nova aŭtoŝoseo oni povas atingi Kosovon de la maro dum du horoj.

Estas projektita kaj komencita ankaŭ

la alia aŭtoŝoseo, liganta Durrës kun Makedonio tra la montaro Martanesh en orienta Albanio, kun tuneloj pli ol tri kilometrojn longaj kaj multaj pontoj. Danke al tiu aŭtoŝoseo Makedonio atingeblos dum unu horo. Krome kreiĝos favoraj kondiĉoj por plilongigi la aŭtoŝoseojn ĝis Serbio kaj Bulgario. Tio i.a. mallongigus la distancon inter Sofio kaj la marhaveno de Varna je pli ol 100 kilometroj.

Bardhyl SELIMI

UKRAINIO

Foroso



Vidaĵo de Foroso kaj ties preĝejo

Aŭdinte la esprimon „perlo de Krimeo”, oni tuj rememoras pri Jalta, ĉarma urbo sur la suda bordo de la ukraina duoninsulo. Alloga kaj multvizitata, ĝi estas loko de turismo kaj ripozo por multaj ukrainianoj, rusianoj kaj eksterlandanoj. Alia perlo tamen, laŭ opinio de multaj, estas la proksime situanta Foroso. Ĝi estas urbotipa loĝloko ĉe la Nigra Maro je distanco 42 km sudokcidente de Jalta. En Foroso loĝas 2185 loĝantoj (2001). Ĝi estas konata klimata kuraĉloko.

P. P. Firsov, esploranto de la regiono, skribas en siaj libroj, ke en la disponeblaj fontoj oni diversmaniere klarigas la devenon de ĝia nomo – merkato, lumturo. Oni opinias, ke la nomo devenas de la vorto „*faros*” (la loko de la antikva

lumturo en malnova Aleksandrio). Tamen la plimulto kredas, ke la plej konvena klarigo de la nomo eble estas ligita kun „vento”, ĉar ĉi tie senĉese blovas.

Nur fine de la 19a jarcento, post kiam rusaj caroj donacis terpecojn al siaj korteganoj, komenciĝis disfloro de la regiono. La areo, sur kiu situas Foroso, iĝis proprietaĵo de la moskva negocisto Aleksandr Grigorjeviĉ Kuznecov. Li komencis efektivi siajn grandiozajn planojn de konstruado. En la aĝo de 30 jaroj li malsaniĝis je tuberkulozo. Tial li estis devigita ekloĝi en Krimeo. Komence li konstruigis du grandajn domojn – unu por sia familio kaj la alian por gastoj. Poste komenciĝis konstruado de preĝejo sur unu el la apude situantaj rokoj. Kaj li zorgis ankaŭ pri la apuddomaj

vegetaĵoj – li aranĝis ĉarmegan parkon kun mirinde belaj kreskaĵoj.

En 1954-1955 en Usono estis eldonita libro kun rememoroj de la eksa rusia ministro pri terposedo A. N. Naumov (1915-1916). Tie pri Foroso eblas legi: „Malfacilas imagi ion pli riĉan kaj pli ĉarman, ol la parko, florejoj, ekzotikaj vegetaĵoj en la krimea Foroso ...”

Dum la sovetia reĝimo la regantoj ne preteratentis tiun belan lokon kaj konstruigis en Foroso ripozdomojn por gvidantoj de la komunista partio. Poste la bienoj transiris en iliajn manojn. Vaste konata estas la fakto, ke en Foroso ripozis Miĥail Gorbaĉov, la unua prezidanto de Sovetio, kiam oni volis aresti kaj forigi lin de la prezidanta posteno (aŭguste 1991).

En Foroso oni regule filmas scenojn de marfilmoj. Nun ĝi estas ŝatata kurackaj ripoz-loko de multaj vizitantoj. Ruslingva proverbo tekstas: „Estas pli bone foje vidi, ol plurfoje aŭdi”. Do, bonvenon al unu el la perloj de bela Krimeo!

Dmitrij CIBULEVSKIJ



Plaĝo de Foroso.

Ĝui simplajn ŝatokupojn subĉiele



HENRI WEISEN

Estas sufoke kaj malsanige sidi endome. En la finna kamparo multaj homoj – sed ne sufiĉe multaj – ŝatas moviĝi en freŝa aero, sendepende de la vetero. Ne nepre estas bezonataj multekostaj sportiloj. Oni ja povas piediri, ĝui la kolorojn de ĉielo kaj arboj, foti, kureti, fiŝkapti, vadi kaj naĝi en lago aŭ rivero, konforme al la loĝloko kaj sezono.

Por hobiaj fiŝkaptistoj ne tre gravas la kaptaĵo, ili estas kontentaj pri la simpla provo kapti fiŝojn, pri la sinmovado sur lago, pri la rigardado de pejzaĝoj kaj spirado de pura aero. Vintre oni povas fari neĝulon kaj kastelon el neĝo, lanternon el neĝbuletoj aŭ el glaciigita akvo en sitelo. Oni povas marŝi sur dika neĝo kaj ridegi pro la malfaciloj, aŭ ĵetadi molajn neĝbulojn al iu celo (malmo-

**La menso kaj korpo
bonfartas,
se oni sufiĉe ofte iras
eksteren.**

laj neĝbuloj estas malpermesitaj). Tuta familio aŭ amika grupo povas amuziĝi kune. Se oni loĝas en urbo, oni unue devas trovi iun parkon aŭ veturi ekster la urbon, sed en kamparaj vilaĝoj, lernejoj kaj kortoj kaj agrikulturaj bienoj oni kutime povas trovi ludteron tuj ekster la elirejo. Post sufiĉa ludado bongustas varma trinkaĵo, malvarma biero, rostitaj kolbasoj kaj buterpanoj.

Domaĝe, ke iuj familioj ne kutimigas al tio la infanojn, kiuj rigidiĝas tro junaj. Pro la troa sidado ĉe komputilo kaj televidilo povas okazi, ke 8-15-jaruloj ne kapablas kaŭriĝi, transkapiĝi, eĉ ne memstare restariĝi, se ili stumblis kaj falis surteren. La gepatroj atentu, ke ili ne tro laŭdu siajn silentajn, nemoviĝemajn kaj bonkondutajn etulojn. Geknaboj bezonas multe pli da liber-aeraj aktivadoj ol plenkreskuloj, kaj la malmultaj lernejoj sportlecionoj ne sufiĉas por kreskigi sanajn infanojn.

Nuntempe oni ofte aĉetas multekostajn ludilojn, sportilojn kaj specialajn vestaĵojn por la libertempo, sed ilin oni baldaŭ ĵetas en ŝrankon aŭ angulon, forgesas kaj neniam decidiĝas vere lerni uzi ilin. La aĉetado tamen ne nepras, oni povas ankaŭ lui kaj provi rakedojn, ske-tilojn, ekipaĵojn por pilkoludoj kaj por ĉiaj novaj hobiaj kaj manieroj sin movi.

Ĉi-vintre en Lestijärvi oni faris golf-trakon sur la glacio de lago kaj invitis homojn, kiuj neniam antaŭe golfludis, lui ĉion bezonatan je modera prezo. En laponstila tendo lagoborde la luigantoj semajnfine deĵoris, bruligis konstantan fajron, invitis la enirintojn sidiĝi sur benkoj, kovritaj per boacofeloj kaj regal- lis ilin per frandaĵetoj (pagendaĵ!). Tra la fumotruo de la tendo enŝvebis neĝeroj, la sidantoj rigardadis nubojn konstante aliformiĝantajn, sunon, lunon. Proksime al la bordo estis uzebla ankaŭ senneĝa ejo por ludo, en kiu oni glitigas dikajn keglojn kiel en kurlingo. La menso kaj korpo bonfartas, se oni sufiĉe ofte iras eksteren.

SALIKO

Supervivo de plej taŭga teorio

Verŝajne ne estas alia scienca teorio, kiu elvokas tiom da kontraŭdiroj kiel la teorio de evolucio. Precipe tio koncernas la teorion de Charles Darwin. Kaj estas kompreneble: ĉar la teorio de evolucio kontraŭstaras al la tiel nomata kreismo, la biblia koncepto, laŭ kiu nia universo estis kreata de Dio dum ses tagoj antaŭ ĉirkaŭ 6000 jaroj. Certe, nuntempe jam ne realiĝas „simiaj procesoj” similaj al tiuj en 1925 en Usono, kaj oni abolis la leĝojn en tiuj usonaj ŝtatoj, kie oni malpermesis instruadon de la teorio de evolucio en lernejoj. Sed religiaj fundamentistoj kaj klerikoj nun ne dormetas, kaj penegas per ĉiuj rimedoj, se ne malpermesi, almenaŭ limigi la instruadon de la teorio de evolucio, aŭ ĉiukaze enigi en la procezon de instruado egale evolucian kaj biblian konceptojn. Kaj certe tio okazas ne nur en Usono, sed en multaj aliaj landoj. Tamen dum 150 jaroj kontraŭ la teorio de evolucio kaj precipe kontraŭ darvinismo kontraŭstaras ne nur kreistoj, sed same multaj ŝtataj kaj sociaj agantoj, sciencistoj, instruistoj, teknikistoj, multaj simplaj civitanoj ktp. Eĉ ne inter bioloĝoj estas solidareco rilate al darvinismo. Multaj el ili estas subtenantoj de lamarckismo, nomogenezo, katastrofismo kaj aliaj, kvankam la plejparto estas partianoj de la darvina teorio de evolucio.

Lamarck – malprospera fondinto de evolucio

La nocio pri evolucio komencis formiĝi ankoraŭ en antikveco. Multaj filozofoj kaj sciencistoj sciis pri ŝtoniĝintaj restaĵoj de bestoj, kiuj tiam reale ne plu ekzistis. Sed jam en la me-

zepoka Eŭropo paroli pri evolucio estis mortdanĝere. Kaj estas mirinde, ke en epoko de Renesanco, kiam estis atingitaj rimarkindaj sukcesoj en fiziko, matematiko, astronomio, ĥemio, medicino ktp, sciencistoj nenion skribis aŭ parolis pri evolucio de viva naturo.

Eĉ ne inter bioloĝoj estas solidareco rilate al darvinismo. Multaj el ili estas subtenantoj de lamarckismo, nomogenezo, katastrofismo kaj aliaj, kvankam la plejparto estas partianoj de la darvina teorio de evolucio.

La fondinto de evolucia ideo en biologio estis la elstara franca sciencisto kaj biologo Jean Baptiste Chevalier de Lamarck. Li unue atentis, ke en la viva naturo pli malsimplaj organismoj konstante anstataŭas pli simplajn. Sed la lastaj ne malaperas, sed transformiĝas en novajn, pli utilajn. La kaŭzoj de tiuj modifoj estas la konstante ŝanĝiĝanta medio, kiu senpere influas la vivan organismon, kaj devigas ĝin adaptiĝi al novaj kondiĉoj. La akiritaj, pli adaptitaj kvalitoj kaj signoj, laŭ Lamarck, estas heredaj. Tre ofte, kiam oni parolas pri la teorio de Lamarck, oni mencias la jenan ekzemplon el lia doktrino: iam la antaŭuloj de la ĝirafo estis malaltaj, sed rezulte de ŝanĝo de klimato, la ar-

boj fariĝis pli altaj, kaj la antaŭuloj de la ĝirafo devis konstante plilongigi la kolon por atingi foliojn. La plilongigoj de kolo estis heredaj, kaj post multaj generacioj fine aperis ĝirafo. Tamen la doktrino de Lamarck pri heredeco de akiritaj utilaj kvalitoj ne estis konfirmita de sciencistoj.

Charles Darwin – la fondinto de la sciencmotivita teorio de evolucio

Darwin en sia fundamenta libro *The Origin of Species by Means of Natural*



Darwin: natura selektado estas la mova forto de evolucio.

Selection („La origino de specioj per natura selektado”) amasigas multnombrajn faktojn pri evolucio de viva naturo, kiujn li senpere observis dum multjara vojaĝo sur ŝipo *Beagle*, kaj argumentas la kaŭzojn de evolucio. Laŭ Darwin, ekde naskiĝo, individuoj de la sama specio diferenciĝas unu de la alia en multaj rilatoj: iuj el ili estas pli aŭ malpli grandaj, pli aŭ malpli rapidaj, fortaj, vivdaŭraj, fekundaj ktp. – nuntempe tio nomiĝas la genetika diverseco. Ili havas diversajn naturajn kapablecojn por resti vivaj en malfavoraj konkurencaj kondiĉoj. Pli adaptitaj, vivkapablaj organismoj ne nur restas vivaj, sed pli ofte hibridiĝas inter si kaj donas pli vivkapablan posteularon. Malpli adaptitaj individuoj malaperas. Tiu procezo ripetiĝas dum multaj generacioj, kaj nomiĝas natura selektado, kiu, laŭ Darwin, alkondukas al apero de pli adaptitaj, pli perfektaj variaĵoj, kaj iom post iom, verŝajne post multaj jarmiloj, al formado de novaj specioj. Do, natura selektado estas la mova forto de evolucio. Kaj evoluciaj ŝanĝoj, laŭ Darwin, okazas tre malrapide, kiel li skribas en sia libro „Naturo ne toleras saltojn”.

Samtempe kun Darwin alia esploro, Alfred Russel Wallace, elpaŝis kun la teorio, kiu estas preskaŭ analoga al tiu de Darwin. Laŭ Wallace, same kiel ĉe Darwin, en evolucio restas vivaj kaj prosperaj pli adaptitaj, pli perfektaj, pli fekundaj organismoj, t.e., ke la mova forto en evolucio ankaŭ estas natura selektado. Tio, ke la sama ideo naskiĝis sendepende kaj samtempe ĉe du diversaj sciencistoj, parolis pri pli granda kredindeco de la teorio.

Argumentoj por kaj kontraŭ la darvina evolucia teorio

En la klarigo de sia teorio, Darwin komparis la artefaritan selektadon. Rezulte de selektado kaj hibridiĝo de la plej interesaj trajtoj, la homaj selektistoj kreis tute novajn variaĵojn de animaloj kaj plantoj. Kaj efektive, en tio estas facile konvinkiĝi, atentante, ekzemple, la tute diversajn variaĵojn de hundoj. Plej gravas, ke materialon por artefarita selektado liveras la naturo mem. Homo nur elektas la necesajn variaĵojn kaj hibridigas ilin inter si. Do, la homo en

artefarita selektado utiligas nur jam ekzistantan genetikan diversecon.

Kontraŭuloj de la darvina teorio oponas, ke rezulte de artefarita selektado estis kreitaj nur diversajn variaĵojn, sed ne novajn speciojn, des malpli novajn genrojn, klasojn, ktp. Tamen darvinistoj klarigas, ke dum artefarita selektado selektistoj ne starigis celon krei novajn speciojn, genrojn ktp, sed nur interesajn kaj allogajn por ili variaĵojn de animaloj kaj plantoj. Krome, la natura selektado diference de artefarita daŭras dum multaj jarmiloj aŭ eĉ milionoj jaroj.

Lastan tempon kontraŭuloj de la darvina teorio ofte citas matematikistojn, kiuj argumentas, ke estas nekredeble la apero rezulte de natura selektado, ekzemple, de tiuj malsimplaj organoj, kiel estas okulo kaj orelo de mamuloj. La matematika probablo de kreado de tiuj perfektaj organoj rezulte de hazardaj procezoj kvazaŭ estas tiel malgranda, ke por tio ne sufiĉas la tempo ekde naskiĝo de nia planedo. Tamen darvinistoj oponas, ke tiuj kaj multaj aliaj malsimplaj organoj ne estis kreitaj tuj en tiel perfekta stato. Por tio estis necesaj verŝajne milionoj



Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net
retbutiko@fel.esperanto.be
 Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko

La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis

ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj,

kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.



MARCO SQUENZA

Ĉe insektoj kaj kankrosimiluloj aperis pli perfektaj, la facetaj okuloj.

jaroj. Ekzemple, ĉe la unuaj primitivaj vivaj estaĵoj estis por lumpercepto nur apartaj lumsentaj ĉeloj. Tervermoj jam povis diferenci la gradon de lumigado. Ĉe insektoj kaj kankrosimiluloj aperis pli perfektaj, la facetaj okuloj ktp.

La plej grava riproĉo, kontraŭ la darvina teorio, kiu estis eldirita tuj post publikigo de lia libro kaj daŭras nuntempe, estas manko en antikvaj paleontologiaj ŝtonigitaĵoj de transiraj formoj de vivaj estaĵoj. Tio eĉ nun maltrankviligas multajn darvinistojn. Tamen ankoraŭ Darwin dum respondo al tiuj kontraŭdiroj atentis, ke sur nia planedo tre ofte aperas grandskalaj ŝanĝoj, kiam, ekzemple, anstataŭ firmtero estiĝis oceano, kio malpligrandigis la eblecon de aperigo de fosiliaj restaĵoj. Krome, la transiraj formoj pro tio tiel nomiĝas, ĉar ili ekzistas nelonge en geologiaj skaloj, kaj rapide transiras en pli adaptitajn kaj perfektajn speciojn. Sed fojfoje la tran-

siraj formoj estis trovitaj. Ankoraŭ dum la vivo de Darwin paleontologoj trovis ŝtoniĝintajn restaĵojn de arĥeopterikso (antikva birdo), kiu havis signojn de reptilio kaj birdo. Kaj kvankam nuntempe sciencistoj opinias, ke arĥeopterikso estis senposteula formo kaj ĝi ne povis transformiĝi en birdon, jam aperas aliaj probablaj kandidatoj por tiu rolo.

Antaŭ nelonge en diversaj revuoj aperis informo, ke en Kanado sciencistoj trovis la transiran ĉeneron inter fiŝoj kaj la unuaj surteraj estaĵoj – la tiel nomatan *Tiktaalik roseae*. La aĝo de la trovaĵo estas 375 milionoj da jaroj. Kvankam *Tiktaalik* precipe loĝis en akvo kaj havis naĝilojn, tamen ĉi tiuj lastaj pli multe memorigis pri membroj de amfibioj. Tiu tri-metra antikva akva besto verŝajne povis elpaŝi la firmteron. Kaj estas kredeble, ke ankoraŭ estos trovitaj aliajn transirajn ĉenerojn en evolucio.

Pasis ses jaroj post la publikigo de

„La origino de specioj” de Darwin, kaj en 1865 la monaĥo Mendel informis pri la rezultoj de siaj genetikaj esploroj. Certe, tio ne estis konata de Darwin, nek de la tuta scienca mondo ĝis la komenco de 20a jarcento. Sed pro la malkovro de Mendel, estis forigita unu grava miskompreno en la darvina teorio. Se antaŭe ŝajnis (kaj tion argumentis kontraŭuloj de Darwin), ke pli adaptitaj variaĵoj tutegale iom post iom perdas siajn avantaĝojn pro hibridiĝo kun malpli adaptitaj, tamen rezulte de la malkovroj de Mendel fariĝis evidente, ke genoj ne malaperas, kaj kondiĉigitaj per genoj, la kvalitoj ne kunmiksiĝas kaj ne akceptas la mezan valoron, sekve povos aperi eĉ post multaj generacioj.

La estonteco de la teorio de evolucio

Atingoj de genetiko kaj molekula biologio pliriĉigis la teorion de evolucio. Mutacioj, genaj rekombinaĵoj, gena interŝanĝo en viva naturo liveras la materialon por natura selektado. Multaj biologoj atribuas grandan signifon al fenomeno, kiu nomiĝas simbiogenezo: formado de malsimplaj organismoj rezulte kunfluiĝo de pli simplaj. Aperis la tiel nomata sintezo-genetika teorio, laŭ kiu evolucio povas okazi ne nur per malrapidaj, sed kaj pli rapidaj, eĉ saltoformaj ŝanĝoj. Tamen tutegale la natura selektado daŭre plenumas en evolucio la fundamentan rolon.

Do, malgraŭ la daŭriganta kritiko kaj maljustaj atakoj, la teorio de evolucio entute, kaj la darvina precipe, sukcese progresas, jam 150 jarojn post la publikigo de „La origino de specioj” kaj 200 jarojn post la naskiĝo de Darwin mem. Certe, en la teorio de evolucio ne ĉio estas plene klarigita. Verŝajne, ĉi tie necesas pli probablecaj aliroj kaj eĉ kunlaborado kun kvanta fiziko kun ĝiaj principoj de suplementeco kaj necerteco. Oni povas esperi, ke la estontaj esploristoj, pli energiaj kaj talentaj, sukcesos pli bone kompreni multajn problemojn de tiu simpla, sed same saĝa teorio.

Vladimir LEMELEV

Muzeo pri la historio de pollandaj judoj

La germanaj nazioj preskaŭ en tute-co realigis sian frenezan planon: „solvo de la juda problemo”, rezulte, ili murdis la plimulton de la judoj en la landoj, kiujn ili okupis en Eŭropo. La murdita popolo restas tamen en memoro per sia granda kontribuo al monda kulturo, scienco kaj civilizo, ankaŭ per siaj atingoj por konservi, malgraŭ grandegaj malhelpoj, sian riĉan identecon.

Estas granda tasko de tiuj, kiuj mirakle saviĝis el la neniigo, konservi tiun riĉan heredaĵon, digne rememorigi. Tio gravas ne nur por memoro, sed tiu riĉa heredaĵo ankaŭ povas signife pliriĉigi la homaron, influu al plibonigo de kunvivado inter la popoloj.

En la mondo funkcias pluraj centroj, kies celo estas omaĝi la memoron de neniigitaj judoj, sed ankaŭ por esploro kaj popularigo de juda historio kaj kulturo. Al la plej signifaj apartenas la instituto *Yad Vashem* en Jerusalemo: la Instituto de Memoro pri la Martiroj de Holokaŭsto¹. Funkcias kelkaj samcelaj institutoj, ekzemple en Novjorko: YIVO, *Institute for Jewish research* (Juda Scienca Instituto), kaj en Vaŝingtono la Muzeo de Holokaŭsto. Dise tra la mondo ankaŭ aliloke oni laboras por similaj celoj.

En Pollando

Sentiĝas tamen granda bezono konstrui plurfunkcian, science, kulture kaj eduke modernan, mult-perilan centron dediĉitan al la historio de judoj ankaŭ en Pollando, kie ili setliĝis jam ekde la 11a jarcento kaj dum kelkaj jarcentoj formis la tutmonde plej multnombrian judan diasporon.

La celo de la muzeo en Varsovio es-

La celo de la muzeo en Varsovio estos kulturado, konservado de la heredaĵo de tiu miljara vivado de judoj sur la teritorio de la nuna Pola Respubliko. Ĝi apogos ĉiujn strebojn, kiuj servas la edukon de la juna generacio en la spirito de reciproka toleremo kaj estimo.

tos kulturado, konservado de la heredaĵo de tiu miljara vivado de judoj sur la teritorio de la nuna Pola Respubliko. Ĝi apogos ĉiujn strebojn, kiuj servas la edukon de la juna generacio en la spirito de reciproka toleremo kaj estimo. La muzeo estas konstruata danke al harmonia kunlaboro de instancoj de la ĉefurbo Varsovio, la ministrejo pri kulturo kaj nacia heredaĵo, la Societo de Juda Historio kaj donacintoj kaj amikoj el la tuta mondo. La muzeo pri la historio de polaj judoj, finkonstruota en 2011, estos la sola en la mondo, kiu tutece sin dediĉas nur al tiu historio. Ĝi samtempe estos nova, plurfunkcia stablaĵo pri kulturo en Varsovio.

Kial en tiu ĉi regiono?

Pollando estis en pasinteco grava centro de juda diasporo. Pluraj judoj loĝantaj en diversaj landoj vaste en la mondo havas siajn radikojn en Pollando. Valoras ĉi-loke rememorigi, ke Pollando estis dum pluraj jarcentoj etne la

Lumo de memoro revenigas vivon.

De ni hodiaŭ dependas,

Ke tiu lumo ne estingiĝu.

plej diferencigita lando en Eŭropo, kio pozitive influis ĝian kulturen evoluon. Signifaj partoj de la heredaĵo de polaj judoj troviĝas ankaŭ sur teritorioj de la nunaj Litovio, Belorusio, Ukrainio kaj okcidenta Rusio. Grandparte ties teritorio dum kelkaj jarcentoj estis ŝtate ligita al Pollando.

Pollando – Polin – signifas en hebrea lingvo: tie ripozu. Kaj malgraŭ, ke ne ĉiam la kunvivado inter poloj kaj judoj estis kontentiga (tio rilatas ankaŭ al aliaj etnoj), la juda loĝantaro trovis tie multe da eblaĵoj por kontribui al la lando, same por konservi sian identecon.

Ĝuste en Pollando disvolviĝis riĉa juda kulturo ĉiutere: literaturo, teatro, pentrarto kaj ankaŭ scienco. Favoris tion certa aŭtonomio, kiun ĝuis tie la judoj. Al la tiurilate plej signifaj institucioj apartenis Sejmo de la Kvar Teritorioj (Parlamento).

La intermilita periodo

En Pollando funkciis en la intermilita periodo (1918–1939) la plej grava esplorcentro kun muzeo kaj biblioteko kun la plej ampleksa librokolekto pri scienco kaj juda kulturo. Temas pri YIVO (Juda Scienca Instituto) en Vilno. Tiu scienca esplora instituto estis establita laŭ decido de la Konferenco de Judaj Sciencistoj en 1925 en Berlino. La iniciatintoj estis i. a. Albert Einstein, Sigmund Freud, Szymon Dubnow kaj Josef Leszczyński. La celo de YIVO estis kolektado kaj registrado de materialo ligita kun ĉiuj aktivecoj de judoj en la mondo; esplorado, pere de plej modernaj metodoj pri pasinteco kaj nuntempo de la judoj. Oni planis fondi altnivelan altlernejon, kiu devus prepari specialistojn en diverskampaj esploroj.

Tiun celon ne eblis realigi pro eksplodo de la dua mondmilito, dum kiu la germanaj okupaciantoj ne nur murdis preskaŭ la tutan judan popolon, sed ankaŭ neniigis grandan parton de ĝia kulturo. En YIVO funkciis jenaj sciencaj sekcioj: filozofia, historia, etnokoniga (temis pri esploro de popoloj), ekonomi-statistika, psikologi-pedagogia kaj junular-esplora. Por doni bildon pri la dimensio de la esplorkampoj valoras mencii, ke ĝi posedis 100 000 librojn kaj la saman nombron de manuskriptoj. En ĝia arkivo troviĝis valoregaj, unikaj dokumentoj rilatantaj judan pasintecon ekde la jaro 1600. Ankaŭ artoverkoj, kaj en tio ikonografio pri sinagogoj. Tre signifa estis la teatrologia kolekto. Ĝi formis muzeon, kiu portis la nomon de Ester Rachel Kamińska, fama juda aktorino, konsiderata kolono de la juda teatro en la 20a jarcento. En tiu ĉi kolekto troviĝis kelkaj miloj da teatraj fotoj, afiŝoj, skulptaĵoskizoj. Tiu riĉa kolekto, kiel sola en YIVO, formis konstantan ekspozicion.

La eldona aktivado de YIVO koncentriĝis je eldonado de monografioj, sed ĝi aperigis ankaŭ serion da broŝuroj pri la plurkampa agado de judoj en scienco kaj kulturo. Riĉa estis ĝia revukolekto. Ĝi ankaŭ eldonadis pritemajn revuojn. Entute inter 1925 kaj 1936 YIVO publikigis 6000 diversstemajn verkojn. YIVO inter 1931 kaj 1939 eldonadis monataĵon *Bleter* (Paĝoj de YIVO).

En Vilno troviĝis ankaŭ la riĉega biblioteko Straszun. YIVO havis 4 filiojn: en Varsovio, Berlino, Parizo kaj Novjorko. En Varsovio funkciis ankaŭ asocio de amikoj de la instituto. En pluraj lokoj estis subtenaj societoj. Similaj ekzistis en kelkaj landoj de Eŭropo kaj ekster ĝi, en Afriko, suda Ameriko, Kanado, Usono, Aŭstralio. Danke al tiu apogo YIVO estis plej signifa centro de kolektado kaj disvastigado de atingoj de la juda popolo. Tiukaŭze pri Vilno, kie ĝi funkciis, oni nostalgias, sed tute prave diras ke „Vilno Jerusalemo estis”.

Post la nazioj

Ekde 1940 la centro de YIVO troviĝas en Novjorko, ĉar en Pollando



Bildo el la libro Wilno Jerozolimq było. Rzecz o Abrahamie Suckewerze (Vilno Jerusalemo estis. Verko pri Abraham Suckewer)

**La germanaj nazioj celis
ne nur neniigi
la judan popolon,
sed ankaŭ forviŝi
pri ĝi la memoron
per detruado de la intelekta
kaj kultura
juda heredaĵo.
Tio evidentiĝis
jam antaŭ
la dua mondmilito,
dum la tiel nomata
kristala nokto.**

sub la okupado ĝi ne povis plu funkcii. Komence ĝi baziĝis nur je sia usona kolekto.

La germanaj nazioj celis ne nur neniigi la judan popolon, sed ankaŭ forviŝi pri ĝi la memoron per detruado de la intelekta kaj kultura juda heredaĵo. Tio evidentiĝis jam antaŭ la dua mondmilito, dum la tiel nomata *kristala nokto*. Tiu nomo devenas de la amaso da vitro, kiu troviĝis sur la stratoj de Berlino kaj aliaj germanaj urboj post la detruo de butikoj

kaj sinagogoj nokte inter la 9a kaj 10a de novembro 1938. Krom centoj da sinagogoj, ankaŭ arkivoj kaj bibliotekoj estis detruitaj. Preskaŭ kompleta detruado okazis, kiam la Tria Regno okupis grandan parton de Eŭropo.

La germanaj okupaciantoj prirabis la instituton kaj la bibliotekon en Vilno. Parton de ĝiaj kolektoj ili forportis al Germanio.

Dum la neniigo de la vilna geto en 1943 la nazioj komisiis al tie restantaj laborantoj bruligi i.a. la restintajn kolektojn de YIVO. Por ne-plenumo de tiu ordono ili minacis per mortopuno. Tamen, kelkaj riskis sian vivon por savi almenaŭ parton de la heredaĵo de la pereinta juda popolo. Inter la savintoj de parto de la kolekto troviĝis la fama juda vilna poeto Abraham Suckewer. Tamen, granda parto de la riĉaĵo, frukto de la juda spirito, pereis en flamoj.

Vilno ĉesis esti *Jerusalemo de la nordo*, kiel prave kaj ne sen fiero ĝi nomiĝis. Riĉenhava libro *Wilno Jerozolimq było. Rzecz o Abrahamie Suckewerze* (Vilno Jerusalemo estis. Verko pri Abraham Suckewer) estis verkita de eminenta konanto de juda kulturo Daniel Kac. La libro aperis en 2003. Eldonis ĝin eldonejo *Pogranicze* (Limteritorio). Ĝi signife kontribuas por flegi la memoron per popularigo de kulturoj de minoritatoj, aparte de la juda. Mi recenzis la verkon por *Słowo Żydowskie* (Juda Vorto) en aprilo 2004.


Nuntempe

Post retrovo postmilito, ĉefe en Germanio, de signifa parto de la kolektoj de YIVO ĝi estis enigita en la novjorka kolekto kaj post tiu tempo YIVO en Novjorko transprenis la taskon, kiun plenumis pli frue la vilna YIVO. Memkompreneble, aktivante en aliaj kondiĉoj, ĝi ne povas kontentige gvidi esploron pri heredaĵo de judoj en ĉiuj landoj, kie ili setliĝis, vivante diaspore.

Postmilito YIVO en Novjorko ligis kontakton kun Juda Historia Instituto (ŻIH) en Varsovio kaj eldonis kelkajn gravajn verkojn pri la holokaŭsto, i.a. *Kroniko de Lodza Geto*. La kunlaboro

daŭras. Delonge tamen sentiĝas la bezono establi scienc-edukan centron en Varsovio, kie dum pluraj jarcentoj vivis la plej multnombra juda diasporo. En lando, kie la neniigo de judoj atingis pinton de neimagebla, sed reale okazinta *solvo de la juda problemo*, amasa murdo de judaj loĝantoj. Ĉiam pli da judoj, inter ili multaj junuloj, venas al Pollando por konatiĝi, laŭeble, kun la pasinteco de la juda popolo, ankaŭ kun radikoj de siaj propraj familioj. Al tio povos signife helpi la muzeo. Ĝi estas ankaŭ necesa por kompletigi, alproprigi scion ĉi-rilatan al monda scienco kaj kulturo. Nepra ĝi estas por la resto de la mirakle savitaj, kiuj malgraŭ ĉio decidis resti en Pollando.

La ideo pri konstruado de tia science kaj kulture valora centro naskiĝis antaŭ pluraj jaroj. Bedaŭrinde, nek la fortoj de kelkdek mil judoj loĝantaj surloke, nek la politika situacio al tio favoris. Nur meze de la 90aj jaroj de pasinta jarcento la ideo maturiĝis kaj interna kaj ekstera politika situacio ebligis komenci ĝian realigon. Ĝi estos finkonstruita en 2011 laŭ projekto de finna arkitekto, Rainer Mahlamäki. Tamen, ne atendante ĝis kiam la muzeo estos finpreta, la plendediĉa kaj fake altkvalita dungitaro sub direktoro Jerzy Halberstadt jam funkciigis kelkajn fakojn de la muzeo. Kiel laborcentro servas al ĝi *Ohel* (hebree: „tendo”) situanta en najbareco de la Monumento pri la Herooj de la Geto centre de la iama juda kvartalo. Jam nun tie la vivo pulsas. Okazas interesaj prelegoj pri historio, tradicio, festoj. Pluraj junulaj grupoj el en- kaj ekster-lando, ĉefe el Israelo kaj Usono, vizitas ĝin. Okazas tie, sub gvido de fakuloj, interesaj metiaj aranĝoj, dum kiuj la junularo havas la eblon esprimi skribe kaj per arto siajn opiniojn pri tio, kio devas okazadi en la muzeo. Solenataj estas signifaj eventoj el la historio de la juda popolo. Ili formas kortuŝajn omaĝo-festojn. Maje 2008 okazis tie aranĝoj por memori la insurrekcion de la Varsovia Geto, okaze de la 65a datreveno. Ĉe tiu okazo ekaktivis la Teatra Scenejo de la muzeo. La 10an kaj la 17an de majo estis tie prezentita



La 10an kaj la 17an de majo estis tie prezentita pole teatraĵo de Rabindranath Tagor “La poŝtoŝicejo. Ne por mi brilas steloj.”

pole teatraĵo de Rabindranath Tagor *La poŝtoŝicejo. Ne por mi brilas steloj*. Per tiu prezentado fare de gimnazianoj el Otwock, urbeto proksima al Varsovio, la muzeo digne omaĝis la orfohejmon de Korczak. Mi estas konvinkita, ke en tiu muzeo devas troviĝi ankaŭ fako pri Esperanto kaj la humanisma idearo, kiun ĝi vehiklas. Ja tie en proksimeco, ĉe apuda strateto, loĝis la familio Zamenhof post translokiĝo el Bjalistoko en 1878. Tia fako plene akordiĝus al la celoj de la muzeo: Esperanto ja ankaŭ apartenas al la juda, pollanda kaj tutmonda spirita heredaĵo.


Mi esperas, ke eblos konvinki la muzean komitaton pri tiu ideo. Mi pretas

donaci tiucele mian riĉan Esperanto-kolekton. Dume, mi venigis finnan Esperanto-grupon, lernantojn de Jorma Ahomäki, kiu kun intereso aŭskultis la klarigojn de gvidantino de la muzeo, ne sen certa fiero konatiĝante kun konstru-projekto de sia samlandano. Klara Zamenhof algluis slipon al la tajpilo, kiu servis al tajpado de esperantaj tekstoj: „Ni laboru kaj esperu”. Valoras sekvi ŝian konsilon kaj esperi kaj kredi, ke eble ankaŭ ĉi-rilate ĉio marŝos bone ...

Zofia BANET-FORNALOWA

1. Laŭlitere *Brulofero*, esprimo uzata pri la amasa neniigo de judoj dum la dua mondmilito.

Bizara romano ... blaisecendrarseska



La titolo de ĉi tiu romano, *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?*, estas iom dusenca. Blaise Cendrars estas pseŭdonimo de Frédéric Louis Sauser, „modernisma” verkisto en la dudeka jarcento. Unue li estis konata pro sia poezio, poste pro sia prozo. Kaj la frazo „Ĉu vi konas Blaise Cendrars?” ja rolas en la romano. Sed ankaŭ al la leganto la aŭtoro faras tiun demandon. Ĉar li cendrarseske prezentas la enhavon de sia verko.

Ne anticipu facile kompreneblan romanon, kun evidenta intrigo, kun komenco, disvolviĝo kaj fino. Oni legas la finon de la romano jam sur la unua paĝo, kvankam ankaŭ sur la lasta paĝo. Sed Manuel de Seabra ne uzas tiun familieran romanistan trukon tiel, kiel ni kutimiĝis al ĝi, en arego da aliaj roma-

noj de aliaj verkistoj.

Facilus resumi la „intrigon” de la romano, se oni volus: junulo malaltaklasa, nomata Konrado, ekamas junulinon, nomatan Nelly, el tre riĉa sociklaso. La diktatoro de lia lando (konjekteble, Portugalio, sed tion ne klare diras la libro) postulas, ke ĉiu virjunulo, kiu malsukcesas en la universitata studado, devas iĝi militisto, same kiel ĉiuj aliaj virjunuloj ne tiel intelektote dotitaj. La militistaro entreprenas militon en Afriko, por eks-termini ribelon tie (pli precize, por „mordi

**Ne anticipu facile
kompreneblan romanon,
kun evidenta intrigo,
kun komenco,
disvolviĝo kaj fino.
Oni legas la finon
de la romano jam
sur la unua paĝo, kvankam
ankaŭ sur la lasta paĝo.**

la negrojn”, kiel diras tre ofte Konrado). Konrado malsukcesis en siaj studoj kaj rolas kiel leŭtenanto en la milito. Efektive, la konflikto stagnas. Konrado eĉ sekrete amikiĝas kun Joal, malamika batalisto, kiun li neniam renkontis, sed kun kiu li kaŝe interŝanĝas literaturaĵojn, i.a. poemplibron de Blaise Cendrars.

Tiel esprimita, legi ĉi tiun romanon estus simpla perdaĉo de tempo, se vi volus legi ordinaran romanon kun evidenta intrigo. Feliĉe, mi devis mem rekonstrui la intrigon supre prezentitan, ĉar via cerbo kirliĝus, se vi kredus legonti rakontan romanon; tamen, sen antaŭdeĉifro de la

kvazaŭkaŝita rakonto, vi tre verŝajne preferus ĵeti la libron en la rubujon, anstataŭ legi post la unuaj kelkaj paĝoj. Sensuspekte komencinte legi, kredante, ke temas pri aventuro en romantika, sed bedaŭrinde militoplena, afrika lando, vi baldaŭ kredus aŭ vin, aŭ la aŭtoron, aŭ eble vin ambaŭ freneza(j).

Legi *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?* sukcese postulas, ke vi konsciu, ke ĝi estas, nu, ne vere surrealismaĵo, nek efektive modernismaĵo, sed sentopoe-mo proza, dispecigita kaj disaranĝita, maskinta sin T.S. Eliot-eske, malgraŭ sia proza karaktero. (Tio estas, eske kiel la poemoj de Eliot, ne kiel ties dramoj.) Legante, malaltigu la laŭton de via intelekto kaj plialtigu la sonon de via interna poeto. Faru el vi psikanalizonton, kiu pacience kaj silente aŭskultas la bizaran sinsekvon de „libera kunligado” de pensoj kaj memorbildoj. Kaj kiu fojfoje kaptas el tiu fatrasaĵo ekkomprenon, kiu konigas al vi la animon de la parolanto.

Kaj tamene pretu legi part-postparte, por eviti entiriĝon en la preskaŭ-sed-ne-vere frenezan menson de la parolanto, kaj ne lasi vin perdiĝi en la mensa kaoso.


Kvankam la libro portas la daton 2007, mi ĝis nun vidis nur unu recenzi-
zon pri ĝi (en *Beletra Almanako* 3). Eble
niajn recenzistojn timigas ĉi tiu unikaĵo
nialingva. Al vi, la legunto, mi nur aten-
tigas, ke la mensa streĉo ĝin legi, valorig-
os vian persiston.

Donald BROADRIBB

Manuel de Seabra: *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?* Eld. IEM, Vieno. 87 paĝoj kudritaj. ISBN 3-01-000033-2.

Prezo ĉe FEL: 13,49 eŭroj + aŭfranko

Aventuroplena historia romano



Antaŭ pli ol dudek jaroj miaj filoj regule prunteprenis bildstriaĵajn librojn de la biblioteko, kiujn ofte ankaŭ mi ĝuis. Inter ili estis *Leonardo*, en kiu ĉefrolas Leonardo da Vinĉi kaj lia iom stulta, timema lernanto. Tiu memoro komence iom influis la legadon de ĉi tiu libro, kiu celas unue gejunulojn, sed interesos ankaŭ pli aĝajn legantojn.

La libro rakontas pri okazaĵoj en la turbulema jaro 1487 en Florenco. Tiam Paolo Masi, 11-jara knabo, lernoservas en la metiejo de Leonardo da Vinĉi. Multajn jarojn poste li priskribas siajn travivaĵojn al sia filo.

En tiu jaro la rilatoj inter la riĉaj familioj De Mediĉoj kaj De la Padzoj pli kaj pli malboniĝas. Unue Paolo favoras la Mediĉojn, ĉar lia patrino iam laboris tie kaj ricevas financan subtenon de ili. Juliano de Mediĉoj ordonis, ke Leonardo da Vinĉi akceptu Paolon kiel lernoserv-

Per tiuj iom pli ol cent paĝoj la leganto ekscias pri parto de la itala historio kaj tiama vivo, ekzemple, la fakto, ke ankaŭ en Eŭropo oni sklavigis homojn; kiel laboris apotekistoj...

vanton. Post renkontiĝo kun sklavineto de La Padzoj, Giraga, li ekfavoras ilin, ĉar ili tre bone traktis la knabinon.

Paolo rakontas kelkajn el siaj sonĝoj, kiuj ofte temas pri inventoj de lia mastro, kiujn li sukcesas provi, interalie flugado per grandaj artefaritaj flugiloj. Okazas multo, kion Paolo ne komprenas – la konduto de la gepatroj inter si, iu nur parte aŭdita aludo pri murdoj, la sinteno de Giraga, kiam li rakontis pri tio, kion li aŭdis. Nur kiam estas tro malfrue, li komprenas la aferon.

Per tiuj iom pli ol cent paĝoj la leganto ekscias pri parto de la itala historio kaj tiama vivo, ekzemple, la fakto, ke ankaŭ en Eŭropo oni sklavigis homojn; la timo, ke oni malsaniĝos je pesto; la flagelantoj; kiel laboris apotekistoj; la granda potenco de riĉaj familioj.

La traduko de Benata Hengstmengel estas flua, agrabla. Mi pensas, tamen, ke pendumitaj personoj pendas ne „sub ŝnuro” sed „je ŝnuro”.

Anneke Buys

Hans Ulrich: *Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi*. Tr. Benata Hengstmengel, kun ilustraĵoj de Miroslava Tomecková. Eld. KAVA-PECH, Dobřichovice, 2008. 111 paĝoj broŝuritaj. ISBN 978-87169-01-8.

Prezo ĉe FEL: 9,90 eŭroj + aŭfranko.



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net


Renkontiĝo de du (sub)kulturoj

Antaŭ 18 jaroj s-ron Aleksander Korĵenkov, posedanton de la eldonejo „Sezonoj”, ekobsedis la ideo eldoni en Esperanto verkojn de unu el la plej kultaj aŭtoroj de la 20a jarcento (eble eĉ la plej kulta!), J. R. R. Tolkien. La projekto realiĝis ne tuj, sed en 1995, 1996 kaj 1997 aperis sinsekve tri volumoj de la verkego *La mastro de l' ringoj* en la majstra traduko de William Auld (en 2007, pro rapida elĉerpiĝo, aperis korektita reeldono), kaj en 2000 – *La hobito*, kiun tradukis Christopher Gledhill. Tiel la verko de angla aŭtoro, jam fariĝinta pro tradukoj fenomeno de pluraj nacilingvaj kulturoj (en certaj lingvoj ekzistas po kelkaj malsamaj tradukoj, ekzemple, en la rusa minimume dek publikigitaj), eniris ankaŭ la internacilingvan kulturon. La eldonisto prave fieras pri la eldono – li ja plenumis ne nur organizajn kaj teknikajn taskojn, sed faris grandan redaktan laboron, konstante komunikiĝante perletere kun la tradukinto.

Korĵenkov dum sia redakta kaj eldo-

na laboro pri la verkoj fariĝis vera fakulo pri la kreado de Tolkien kaj ligita kun ĝi aparta (sub)kulturo. Kaj tio instigis lin ofte prelegi en diversaj esperantistaj aranĝoj pri la tolkienismo ĝenerale kaj pri la temo *Tolkien en Esperanto* speciale. Tion li faris dekojn da fojoj, kaj, fin-fine, aperigis la resuman tekston de la prelego en la formo de aparta konciza broŝuro. Fakte, la teksto povus esti ankaŭ antaŭ- aŭ post-parolo por iu eldono de *La mastro*. Kvankam ĝi ne estas dividita je apartaj sekcioj, la teksto klare dividiĝas je kvar partoj: 1) signifo de la verkaro de Tolkien kiel bazo de aparta subkulturo; 2) biografio de Tolkien kaj de liaj verkoj pri Meztero; 3) historio de esperantlingva versio de *La mastro* kaj ĝiaj lingvaj karakterizoj; 4) loko de la traduko por evoluigo de la esperanta tradukarto kaj kulturo ĝenerale.



Ĉiuj listigitaj temoj estas priskribitaj koncize, sed elĉerpe, por ke la leganto ricevu pri ili plenan komprenon. La teksto estas verkita kun granda inspiro, montranta entuziasmon de la aŭtoro pri



la afero. La plej enpensiga temo por esperantistoj estas, tamen, la komenca parto, kiu montras skizon de tolkienisma komunumo kaj kulturo. Ni vidas multajn paralelojn kun la komunumo esperantista; eĉ planlingva komponanto en ĝi ĉeestas: ja la plej evoluintaj tolkienanoj disvolvas kaj parolas la elfan kaj aliajn artajn lingvojn, kies ĝermon kreis profesoro! Certe, nekompareblas la sociaj celoj de la tolkienismo kaj esperantismo – la unua estas ne pli ol eskapisma poramuza movado, dum la dua celas grandajn ŝanĝojn en la tuta monda ordo – sed ja ambaŭ estas mikrosocioj, funkciantaj ene de makrosocio; ambaŭ estas subkulturoj, funkciantaj ene de la tuthomara kulturo! Do, kompara esploro de ni kaj ili (kaj eventuale kun aliaj similaj mikrosocioj, havantaj proprajn kulturojn) povus malkovri multon novan pri ni. Kaj la traduko, krom ĉiuj siaj pure lingvaj, artaj kaj kulturaj signifoj, havas tiun sencon, ke ĝi kreas la ponton inter la kulturoj nia kaj ilia.

La broŝuro estas leginda de tiuj, kiuj ŝatas (kaj, des pli, *amas*) verkojn de Tolkien kaj ankaŭ de tiuj, kiuj meditas pri la vojoj, sorto kaj loko de la internacilingva kulturo en la makrosocio.

Nikolao GUDSKOV



Aleksander Korĵenkov: *Unu ringo ilin regas. J. R. R. Tolkien en Esperanto*. (Serio *Sed ne el katedro*; vol. 4) Sezonoj, Kaliningrado, 2008. 16 paĝoj, broŝurita. ISBN forestas.

Pli pri la mistera insulo

En MONATO 2004/7 aperis artikolo mia kun la titolo *Mistera insulo Ailsa Craig* [ejlza krejg]. Temis pri insuleto – fakte, apenaŭ pli ol alta roko, kiu situas en la maro 12 km okcidente de la sud-okcidenta marbordo de Skotlando. Ĝia antikva gaela nomo: *Creag Ealasaid* [krejk elasadj] estas ankoraŭ uzata inter gaelparolantoj. La plej proksima haveno, de kie antaŭe regule veturis ŝipoj al la insulo, nomiĝas Girvan (Garbhan [garvan] en la gaela). La insulo longas iom pli ol 1,2 km, kaj larĝas iom pli ol 0,8 km. Ĝia alto tamen estas 338,65 m, do ĝi staras kiel imponega monto ĉe la fora horizonto, kiam oni ĝin rigardas ekde la plaĝo de Girvan. Kiel la fama Ayres-roko en Aŭstralio, ĝia koloro konstante ŝanĝiĝas laŭ la vetero kaj la tempo de la tago. Kelkfoje ĝi aspektas alloge invita; aliffoje, terure minaca – ne senkaŭze, ĉar dum la jarcentoj, tie okazis pluraj ŝippereoj. Pro tio, sur ĝi estas du lumturoj. En iu antikva verko pri la hibrida insularo, la aŭtoro inkludis la rokon kiel la plej sudan insulon de tiu arkipelago.

Diversaj gvidlibroj pri Ailsa Craig kaj la Ayrshire-regiono al kiu ĝi apartenas, asertas, ke tiu insulo neniam havis daŭran loĝantaron. Tamen, iom post publikigo en MONATO de la menciita eseo, mi konstatis, ne nur ke, ĝis antaŭ kelkaj jardekoj, *estis* tie daŭra loĝantaro, sed ke tiu eta komunumo konsistis el anoj de la familio de mia patrino. Tion mi malkovris kiam unu el miaj amikoj, kiu loĝas en la urbo Girvan, donacis al mi libron kaj DVD-diskon pri Ailsa Craig. La disko montras belajn vidaĵojn de la insulo, kaj inkludas longajn intervjuojn kun ankoraŭ ekzistantaj membroj de la familioj Girvan kaj Milroy, parencoj de mia patrino.

Familiaj nomoj

Kvankam mi naskiĝis en Bolivio, do, laŭ sud-amerika leĝo, mi estas bolivia-no, miaj gepatroj estis skotoj. Mia patro, ano de la nord-skota klano MacAoidh (angligita Mackay, McKay [makaj]) devenas de la urbego Glasgovo; mia patrino, de graflando Ayrshire [ejrŝajr]

(gale: Inbhir Air [in'r aajr]), regiono en kiu situas Girvan. La familia nomo de la avino de mia patrino, je la ina flanko, estis Girvan, kaj ŝia familio devenas de la samnoma urbeto. (En antikveco skotoj ne havis familiajn nomojn – krom la klannomo, se ili estis klananoj – do kelkfoje ili estis konataj per la nomo de sia loĝloko.) Lokanojn distingis du branĉoj de la Girvan-familio, nome, „girvanoj de Girvan”, kaj „girvanoj de Ailsa”. Pluraj generacioj de la lasta grupo loĝis ekde la 19a jarcento sur la insuleto, kie la viroj okupiĝis pri minado de la diverskolora granito el kiu konsistis la roko. Tiu granito estis (kaj ankoraŭ estas) tre ŝatata, kaj estas uzata por fabrikado de *curling*-ŝtonoj. *Curling* (proksima prononco: „korling”) estas tradicia skota vintra sporto, en kiu pezaj rondaj ŝtonoj kun metalaj ansoj estas glitigataj sur glacio. Al la urba branĉo de la familio apartenis la ŝipestroj de malgranda floto de ŝipoj (inkluzive de fama ŝipo „Lady Ailsa”), kiu transportis la graniton de Ailsa Craig al la ĉeflando, kaj, dumsomere, turistojn, kiuj pasigis kelkajn horojn sur la insulo, promenante kaj gustumante teon kaj hejmfaritajn bakaĵojn en la eta insula teejo de unu el la sinjorinoj Girvan. Tia turismo ne plu estas permesita, ĉar la insulo, kiu apartenas al loka nobelo, nun estas protektata ornitologia kaj botanika rezervejo. Tamen, el la haveno en Girvan, ekskursantoj povas per turisma ŝipeto rondiri la maron ĉirkaŭ la insulo, kaj rigardi ĝin de proksime, kvankam ili ne plu rajtas meti piedon sur ĝin.

Nostalgio

La familio Girvan ne plu loĝas sur Ailsa Craig. Dum la intervjuoj, diversaj familianoj esprimas nostalgion pri



*Insulanoj
(familio
Girvan).*



„La Kastelo” (fakte, nur turo) sur Ailsa Craig.

la jaroj, kiam la roko estis ilia hejmo. Laŭ ili, ĝi estis magia kaj loko, kie la loĝantoj estis sanaj, feliĉaj kaj bone nutritaj. Ili diras, ke ili neniam suferis de malsato, ĉar abundis kaprolakto, ŝafaĵo, kuniklaĵo kaj fiŝo. Plie, ili neniam enuis, ĉar ĉiam estis io interesa por okupi la tempon. Dimanĉe ili kutimis promeni sur la bela verda altaĵo, kie kreskis multaj specioj de floroj kaj plantoj. Faŭno konsistis el marbirdoj, kaproj, ŝafoj kaj kunikloj. Marbirdoj ankoraŭ abundas, sed malpliĝis la nombro de birdoj de kelkaj specioj, precipe de fraterkuloj.

Ne nur Girvan-familianoj tie loĝis, ĉar la lumtur-gardistoj havis edzinojn kaj infanojn, kaj la komunumo ankaŭ inkludis dungitajn granitministojn. Sabate okazis dancoj en kiuj partoprenadis inter 30 kaj 40 personoj. La muzikon provizis la insulanoj mem.

Mia patrino kutimis rakonti pri la Girvan-branĉo de sia familio kaj ŝi ofte menciis sian parencon kapitano Girvan, ŝipestro de *Lady Ailsa*¹. Tiu estis Vilhelmo Girvan, laŭŝajne la lasta posedanto de tiu titolo kaj de la ŝipoj. Tamen, mia patrino neniam menciis – kaj kredeble



ne sciis – ke iam parto de la familio loĝis sur la insuleto. Mi dubas, ke ekzistas alia insulo en la okcidenta skota insularo, kiu estas tiom malgranda kaj kiu iam subtenis tiom laŭproportie grandan komunumon.

Resume, Ailsa Craig estas eĉ pli magia ol mi priskribis en mia antaŭa artikolo, kaj por mi persone estas fascine, ke ĝi ludis rolon en mia familia historio.

Garvan MAKAI

1. Modelo de la ŝipo „Lady Ailsa” [lejdi ejlza] vidiĝas en la muzeo de la Instituto McKechnie en Girvan.



Suda flanko de la insulo.



Ŝipo apud la insulo.

Trastreku kaj aldonu !

Trastreku la menciitajn vortojn en la kadro. Ili legeblas en ĉiuj direktoj! Sed atentu du vicojn mi “forĝesis”. Vi mem devas diveni la literojn kiuj formas radikvorton dupartan en la du grizaj kolumnoj.

Sendu la solvon antaŭ la 1a de oktobro 2009 al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al enigmoj@monato.net.

Inter la solvintoj Monato elektos tri personojn, kiuj ricevos valoran premion!

JPVDD

afrikon	koalo	muson
arom’	kret’	nest’
atol’	lakmus’	opal’
flar’	lia	pur’
horde’	liena	semajno
hotel’	maklere	sup’
julia	menu’	sur
kamel’	metro	tost’
kato	moka	tria
kest’	motoron	tut’

L	O		A	A	N		I	L
A	F		I	K	O		E	E
K	O		L	O	R		E	M
M	E		U	M	O		A	A
U	R		J	H	T		R	K
S	U		T	A	O		A	L
O	S		I	I	M		U	E
N	S		A	L	F		D	R
T	U		T	S	E		S	E

La solvo de la litera sudoku de Monato 3/2009

Malgraŭ erareto nia tamen solvebla ĝi estis, ne necesis rezigni. Feliĉe la plimulto ne rezignis, kaj tri ilinter ili ricevos libropremion, nome:

Juan Azcuénaga Vierna (Hispanio),

Neeltje Boersma-Traummüller (Svedio),

Renato Nunes Bastos (Brazilo).

Kore gratulas via enigmo-redaktoro (ankoraŭ vivanta).

S	T	R	A	N	G	O	L	I
O	I	A	R	L	S	T	N	G
N	G	L	T	I	O	R	S	A
T	A	G	N	S	R	L	I	O
L	R	S	I	O	A	G	T	N
I	O	N	L	G	T	S	A	R
A	S	O	G	T	I	N	R	L
G	L	I	S	R	N	A	O	T
R	N	T	O	A	L	I	G	S

MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...

Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Paĝoj: 624; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 33

ISBN: 978-90-77066-39-3

Prezo ĉe FEL: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte
de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

anoncetoj

Sur Interreto aperis **La Teorio pri Ĉio**, vivoverko de Manuel Halvelik, je la adreso www.sotragogismo.net. Ĝi estas senpage elŝutebla, sed ege ampleksa.

La **Deklingva manlibro pri politiko** de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono. Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, butiko@fel.esperanto.be kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

Vizitu Iperity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 2000 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.


"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj



**enciklopedieto
kun informoj kiel
telefoni el kaj al
eksterlando**

POŜKALENDARO

- kun spaco por fari notojn
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

ENCIKLOPEDIETO

- kun ŝtatoj de l'mondo
- kun ĉefurboj, loĝantoj ktp.
- kaj multe pli

La Jaro 2010

via poŝamiko dum la tuta jaro 2010



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto (vidu liston kaj prezojn en p.4)

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun
por la 3 venontaj jaroj (-5%) aŭ por la 5 venontaj jaroj (-10%)